REGO

☆ RUSIA ESPERANTO-GAZETO ☆

komuna eldono de REU kaj REJM *№ 4 (23) aŭgusto 2004*



IJK – duan fojon en Rusio

en la numero

la 60-a Internacia Junulara Kongreso apud Kovrov
RET-04 en Tiĥvin
UK-89, BET-40 kaj aliaj aranĝoj
omaĝe al la 20-jara jubileo de OkSEJT-26 en Armenio
Vladimir Samodaj – Honora Membro de UEA
esperantisto en Eŭropa Parlamento
"Bulteno de REU" kaj "REJM-info"
novaĵoj, anekdotoj kaj multo alia

Moskvo, 2004

RET-04: "OkSEJT forever"



IJK-60: "И Ленин, такой молодой..."





MEDITOJ POST IJK

Hejmas mi en Montrealo post monato en Rusio. Mi solas kaj legas… kia trankvilo post monato da aktiva vivo en Rusia Esperantujo. Mi legas libron pri feliĉo en la vivo, kaj tio multe pensigas min. Kio pli gravas, materialaj posedaĵoj aŭ amikaro? Mi min demandas: kial mi ŝatas vojaĝi? Kial mi ŝatas Esperanton? Kial mi sentas min aparte feliĉa inter esperantistoj? Kial elspezi sufiĉe multe da mono por konatiĝi kun homoj el diversaj landoj, sciante ke eble mi neniam revidos ilin?

Eble ĉar mi sentas ke mi partoprenas en io unika. La ekstera mondo ne komprenas, kion ni sentas kiam ni kunas. Mi certe povus pagi por mi hotelon kaj komforton dum miaj ferioj kaj iri al turistaj lokoj, sed kial anstataŭe mi tiom ĝuas konatiĝi, amikiĝi kun homoj el la tuta mondo? Multaj homoj kolektas ion, ĉu mia kolekto konsistas el tutmonda amikaro?!



Mi vivas en Kanado, en unu el plej riĉaj landoj de la mondo, kaj amaso da homoj ŝatus veni vivi tien. Estas multaj ebloj, senpaga sanservo, altnivela edukado, spaco kaj multe pli. Kial, malgraŭ ĉio tio, multaj homoj malfeliĉas en Kanado? Ekzemple, en Kebekio ni havas unu el la plej altaj niveloj de junula sinmortigo en la mondo! Kial junuloj, kiuj principe povus havi bonan vivon, ne deziras plu vivi? Mi vizitis landojn kun multaj malfacilaĵoj kaj kun malalta sinmortigo… kial do?

Eble tio, kio mankas al tiuj junuloj, kiuj posedas ĉion (sen penoj) en propra ĉambro, kiel televido, komputilo, telefono ktp. kaj kiuj estas ofte solaj infanoj en sia familio, estas sento ke ili apartenas al la monda komunumo. Tio, kio mankas al ili, estas ne posedi ion plian, sed travivi, kiom belas internacia amikeco. Kiom belas senti sin parto de tutmonda amikaro. Eble mi eraras, eble mi estas revulo, sed mia revo beligas mian vivon, kaj mi esperas longe revi.

Dankon al vi, karegaj rusianoj, por tiom belaj momentoj de amikeco, de bonkoreco kaj de homeco. Vi povas fieri pri MAK, la 60-a IJK kaj PK en Ĉebo. Mi jam forgesis, kiam oni konstruis la katedralon apud Kremlo aŭ kiom altas la statuo de ĉuvaŝa patrino en Ĉeboksari, sed neniam forgesos ke vi traktis min dum mia restado en Rusio kiel proksiman amikon, eĉ kiel fraton.

Normando Fleury (Kanado)

MIA VIZIO DE KONGRESO EN RUSIO

IJK okazas ĉi-jare en Rusio duan fojon.
Tial ni elektis por la feriado vojon,
Vidi tiun landon el diversaj anguloj,
De metropoloj ĝis kampo kun kuloj.

Mi loĝas ekster Ŝengena landlimo,
Kaj por mi jam estas normala kutimo,
Prepari vizon jam sufiĉe frue,
Kaj aliajn paperojn bezonatajn plue.

Tiun fojon, tamen, homoj el Okcidento,
Finfine estis kun la sama sento:
Kolekti paperojn, timi atendante,
Kaj ricevi vizon plej lastmomente.

Bonŝance, tamen, ke por leteropeto,
Ni uzis bonan helpilon: Interreton.
Novaĵojn pri vizoj ĉiu esperantisto
Ricevis ĝustatempe per la retlisto.

En Moskvo kaj Peterburg antaŭkongresoj
Estis ĝenerale grandaj sukcesoj.
Moskvo estas urbo granda, tamen ĉarma,
Sed en la hotelo la akvo estis malvarma.

Ses horojn al Kovrov aŭtobuso iris,
Urbocentron pasis kaj mi iom miris:
Kiel malproksime estas tiu IJoKo,
Eĉ MELA[1] estas en malpli sovaĝa loko.

Vere estas diversaj aferoj en la kampo.
Preskaŭ mankas nur spirit' de Aladin-lampo.
En la baseno akvo tutan tempon verdis,
Sed tro densa por serĉi, se vi ion perdis.

Sur afiŝo estis bildo kun mesaĝo:
Mi kapablas ripari ĉiun ŝudamaĝon.
Alikaze vi devus malbonajn ŝuojn ĵeti,
Piedirante kvin kilometrojn por ion aĉeti.

Dum la unua vespero estis unua divido.
Ni rigardis nian koloron de ŝildo.
Kolektiĝis grupoj kaj tekstojn ricevis –
De fabeloj pri kiuj la infanoj revis.

La manĝaĵon servis grupo da soldatoj,
Kaj ĝin rajtis manĝi eĉ la memzorgantoj.
Poste mi demadis sin irinte en liton:
Ĉu pro manĝaĵ' Sovetoj perdis Afganan militon?

---

[1] MELA (MEmzorga LAgumado) – somera E-aranĝo en Hungario.

Tamen, poste la manĝaĵo pliboniĝis,
Kaj en la kazo se vi unue ne malsaniĝis,
Vi povis manĝi viandon, kukon kaj supon,
Rigardante kelnerinon kaj ŝian etan jupon.
Duan tagon okazis la Rusa foiro:
La naciaj dancoj apud ĉefeniro,
Kaj kolektado de diversaj koloraj paperoj,
Premioj por segado kaj kolorigo de kuleroj.
Bedaŭrinde la festo de Ivano Kupala
Ne okazis pro pluvo nenormala.
Sed estis diversaj muzikaj koncertoj,
De diversaj grupoj kun diversaj spertoj.
Ĵomart, Nataŝa, "Perdita Generacio" plaĉis al homoj.
Se tio ne sufiĉas, kantis ankaŭ novaj nomoj.
Kaj koncert' de grupo el Niĵnij-a Novogrado,
Kiam planko preskaŭ rompiĝis pro la saltado.
Kutime dum renkontiĝoj teatrumas kroatoj,
Pro kio ili estas kun kongresaj rabatoj.
Tiun fojon, tamen, organizantoj monon ŝparis,
Kaj aktivan teatradon laŭ kolorŝildo preparis.
Por mi estis la plej bona teatra ideo,
Kiam japanino servas per "Estas teo",
Kaj en tendon eniris "ninĝoj", karateistoj,
Kaj preskaŭ nudaj sumoistoj.
Mi devas diri ke ĉiu problemo tie solvendas,
Nur en la kazo se vi mem plendas.
Mia ĉambro estis malpura kaj havis aĉan odoron,
Poste ne nur puriĝis, sed estis en nova koloro.
Por registrado ni aktivigis grandan forton.
Kvar tagojn mi ne vidis mian pasporton.
Sed mi ricevis aldonan promeson,
Ke estos pli facile dum postkongreso.
Kun ni estis Lenin, simbolo de komunista movado,
Kaj io pli komunista, komuna duŝado.
Nur ses duŝoj por pli ol tricent homoj,
Kaj virinoj babilis en atendejdomoj.
Kiam pasis tempo por subiro de suno,
Virina banejo fariĝas la saŭno.
Viroj kaj virinoj tie ŝvitis nude,
Diri pri detaloj povus esti krude.
Pro tio alternativa saŭno ekzistis:
En koncertejo ni vestitaj ŝvitis.
Estis ankaŭ magia fontano
Kiu servis bieron al ĉiu kongresano.


Homoj ne irontaj al UK-o en Ĉinio,
Havis Orientan korton kun aromterapio,
Noktomeze spiris aromon de ĉerizo,
Kaj dum multaj tagoj en manĝej’ estis rizo.
Estis ankaŭ prezentado de kulturoj,
Kun la afiŝoj penditaj sur muroj,
Gratulon al Dagestan’ por bela preparado,
Kaj al Kroatio por la ĉokolado.
La plej seriozaj estis la studentoj,
De “Flugiloj de malfacila vento”,
Kiuj lernis nokte en la koridoro
Prepari ekzamenon je noktomeza horo.
Ekskurso al Vladimir estis vere en ordo,
Ni rigardis preĝejon kaj la Oran pordon.
Stranga afer’ estis manĝad’ ekster urbo,
Kiam la ŝofor’ haltis apud sola arbo.
En Suzdalj koncertis bonaj pop-grupoj,
En kiuj estis tri ortodoksaj popoj.
Ke ekskurso havu bonan finon,
Eblis aĉeti ankaŭ mielan vinon.
Sen baleto ne eblas viziti Rusion,
Kaj unu rakontis tutan historion:
Kiel la bardo forlasis sian domon,
Kaj iris batali kontraŭ Romon.
Jam klasikas iri nokte al diskejo.
La stranga afero estis kun trinkejo,
Ĉar ĝi funkciis nur ekde noktomezo,
Pro timo ke impostistoj estu en kongreso.
Ekskurso al Kovrov sugestis de graveco senton.
Polico akompanis nin kontraŭ akcidento.
Oni montris ĉefan urban vidindaĵon,
La fabrikon kiu bonigas fekaĵon.
Anstataŭ gufujo ekzistis kafejo,
Kaj la nokta lignofajro en la tuta ejo.
Eblis vidi filmojn sur eta ekrano,
Preskaŭ kovrebla per unu sola mano.
Post denova manĝado de rizo,
Okazis unu malgranda kvizo,
Kaj alia ludo por montri la saĝon,
Simuli la Pasportservan vojaĝon.
La ferma vespero estis de eventoj reprizo,
Aŭkcio de disko, viŝtuko kaj T-ĉemizo,
Interalie disdonado de diplomoj,
En diversaj kategorioj por diversaj homoj.

Oni povas ankaŭ multajn aferojn diri,
Bedaŭrinde venas tempo por foriri.
Dankon, organizantoj, ĉio pasis sane.
Ĝis revido venontjare en Zakopane.

Samir Ribic (Bosnio-Hercegovino)

IJK EN KOVROV, IOM DA IMPRESOJ

Mi mem partoprenis la kongreson nur dum la du lastaj tagoj, sed tio sufiĉis por vidi, ke IJK-60 plene sukcesis. La programo estis riĉa kaj abunda, la nutraj kaj loĝaj kondiĉoj – kontentigaj kaj akcepteblaj por ĉiuj, sendepende de la financa bonstato. Bonege laboris la organiza teamo, kunordigata de Vitalik Malenko. Funkciis kongresa televido (zorgis Kostik Viĥrov), eldoniĝis IJK-revuo "Betula Folio" (bedaŭrinde nur unu numero, 18-paĝa, ĝi nun troveblas ĉe la retadreso <http://uea.org/pdf/betula_folio.pdf>). Kaj certe multis koncertoj: de Ĵomart kaj Nataŝa, de dan-sveda "Perdita Generacio", "Atentema Vu" (S.Bozin kaj kompanio) kaj pluraj aliaj. Ĉiunokte oni prezentis rusajn filmojn kun E-subtitoloj. Okazis trejnadoj de instruistoj kaj kluborganizantoj. La ceteraj programoj estis tiom variaj kaj multnombraj, ke ilin apenaŭ eblas listigi. Kutime okazis po 5-8 paralelaj aranĝoj.



"tri forteguloj", kiuj povas kompari nunan IJK-on kun tiu en 1995 en Serovo: Ĵomart Amzeev, Andrej Grigorjevskij, Garik Kokolija

La kongreso estis eksterordinara pro la riĉeco de la antaŭ- kaj postkongresaj akompanaj aranĝoj. Antaŭ la IJK brile pasis la antaŭkongresoj en Peterburgo (ĉ. 30 partoprenantoj), en Moskvo (ĉ. 50 partoprenantoj) kaj OkSEJT, kiu iĝis la instrua antaŭkongresa aranĝo (57 partoprenantoj). Post IJK kongresanoj ekvojaĝis al Ĉeboksari kaj Novosibirsk por partopreni tie la postkongresojn. Kelkaj personoj iris al NESTO, naturista E-tendaro, okazinta proksime de N.Novgorod.

Kiel kunordiginto de la antaŭa rusia IJK, mi kuraĝas aserti, ke la nuna IJK programe kaj teknike estis multe pli altnivela ol tiu. Fakte en 1995 mi estis certa, ke IJK plene fiaskis, nur la postaj ardaj dankoj kaj laŭdoj de la partoprenintoj (iujn mi aŭdis eĉ dum tiu ĉi IJK) iom po iom konvinkis min, ke ne estis tiel. Do, nun ni atendu la impresojn de la plentempaj partoprenintoj de jam iĝinta historio IJK-60...

Andrej Grigorjevskij (Ŝumerlja, Ĉuvaŝio)


la geprincoj Ĵenja Berger kaj Mikaelo Bronŝtejn

ETERNA MITRALETO

rakonto pri RET-04 en Tiĥvin

Estas malnova anekdoto el la tempoj de perestrojko, kiam estis planoj pri konverto de multaj militaj uzinoj al farado de pacaj maŝinoj. La laboristoj de la uzino, kie antaŭe estis produktataj Kalaŝnikov-mitraletoj, plendis: “Sendepende de tio, kion ni intencas produkti, finfine ĉiam rezultiĝas mitraleto”. Io simila okazas pri grandaj rusiaj someraj E-aranĝoj. Sendepende de tio, kiaspecan aranĝon oni volas organizi, finfine ĉiam rezultiĝas OkSEJT. Senduba pruvo de tiu fenomeno estas la nuna somero, kiam fakte okazis du OkSEJT-oj (krom tiu aranĝo, kiu havis la titolon OkSEJT-44). La organizita de REJM Internacia Junulara Kongreso apud Kovrov kun 355 partoprenintoj (el kiuj 254 venis el ekssovetiaj landoj) laŭ sia spirito kaj programo estis fakte bona OkSEJT kun vasta internacia partopreno. Se forpreni saŭnon, drinkejon kaj TEJO-komitaton kaj aldoni matenajn kunvenojn kaj iom pli da lignofajroj, la diferenco preskaŭ ne rimarkeblos, kvankam multaj el nunaj REJM-aktivuloj neniam partoprenis en veraj OkSEJT-oj (lasta el kiuj okazis en la sama Kovrova bazejo en 2001). Verŝajne OkSEJT-aj tradicioj transdoniĝas jam en la gena nivelo. Kaj mem la tendaro OkSEJT-44, okazinta apud Kovrov antaŭ IJK, absolute similis al paroligaj periodoj, kiuj estis organizataj antaŭ iamaj OkSEJT-oj.

Ĉar preskaŭ tuta moviĝkapabla rusia E-junularo partoprenis en IJK kaj ne havas eblojn por longaj vojaĝoj dufoje en unu somero, al RET-04 (okazinta apud Tiĥvin dum la 14-22-a de aŭgusto) venis plejparte E-veteranoj kaj mezaĝuloj. Kaj rezultiĝis OkSEJT (denove!) por tiu parto de nia esperantistaro. La temo de la aranĝo estis “Nia kulturo – nia espero”.


kantas la uralanoj

Entute en RET estis registritaj 70 personoj, inter kiuj estis 2 ukrainianoj kaj 1 nederlandano, estis reprezentitaj 21 loĝlokoj. La averaĝa aĝo de la partoprenintoj estis 42 jaroj, la averaĝa E-staĝo – 15 jaroj, ĉe 11 personoj la staĝo superis 30 jarojn. Tio signifis, ke grandan parton de la RET-anoj konsistigis spertuloj, kiuj partoprenis kaj organizis

multajn OkSEJT-ojn. Do, la organizantoj ne mankis, tial preskaŭ ĉiu programero estis preparita kaj okazigita altnivele kaj interese.


la tiĥvinanoj ne nur bone organizas, sed ankaŭ bonege kantas

Nun mi kurte rakontu pri la plej interesaj aranĝoj dum RET. Pli detalajn rakontojn kaj impresojn pri tiu ĉi aranĝo vi povos legi en sekva numero de REGo.

Preskaŭ ĉiutage okazis "Konatiĝu:…", kie la plej interesaj personoj rakontis pri siaj vivo kaj E-agado. Inter ili estis Valeria Cvetkova, Vladimir Samodaj, Mikaelo Lineckij, Gennadij Ŝilo, Viktor Kudrjavcev. Inter la prelegoj impresis tiuj pri literaturaj jubileoj de la jaro (Nikolao Gudskov) kaj pri la jubileo de Montevidea rezolucio de Unesko (Viktoro Aroloviĉ). Okazis kelkaj diskutoj, ekz. "Nobelpremio por esperantisto", "Etiko de retumado", "Traduki aŭ ne traduki". Grandan intereson vekis la kvizoj: pri Esperanta kulturo kaj historio, preparita de Viktoro Aroloviĉ, kaj pri E-muziko, preparita de Aleksandr Belov. Multis imitaĵoj de popularaj televidaj ludoj: Maŝa Aniŝĉenko kaj Dima Ŝevĉenko okazigis "Malfortan ĉeneron" kaj "100 al 1", Raja Kudrjavceva – "Bluf-klubon", Saŝa Belov – "Kio? Kie? Kiam?".

Ĉiumatene okazis matena gimnastiko kun pli ol 10 partoprenantoj ĉiufoje. Ĉiutage brile gvidis la paroligan kurson Svetlana Smetanina. Pro la oftaj pluvoj lignofajro okazis nur unufoje. Sed ĉiuvespere ĝis malfrua nokto plejmulto kolektiĝis en la kafejo por komuna kantado, babilado kaj teumado. Dum RET-aj tagoj ĉiuj kun plezuro esploris la ekspoziciojn: de E-insignoj el kolekto de Mikaelo Bronŝtejn, de belaj fotoj el kolekto de Vladimir Samodaj, de desegnaĵoj de Varvara Cvetkova. Ne mankis ankaŭ la libroservo, okazigita de Dima Ŝevĉenko. Veran ĝuon por la spektantoj kaj aŭskultantoj donis la benefico de Mikaelo Bronŝtejn, koncerto de la tiĥvinanoj, kantado de Nina Djomuŝkina kaj Aleksandr Osokin, la



efektive ĉiuj aĝoj estis reprezentitaj en RET-04



por sia benefico Mikaselo Bronŝtejn estis enportita

tradicia KGS, organizita de Mikaelo Lineckij, komuna koncerto en la adiaŭa vespero. Omaĝe al OkSEJT-18 estis farita 5-kilometra piedmarŝo al Astraĉa kun rakonto pri la tendaro, kiu okazis tie antaŭ 28 jaroj.

En la ekskursa tago la RET-anoj matene havis ekskurson al Tiĥvina monaĥejo kaj povis vidi tie la faman ikonon de Tiĥvina Dipatrino, pri kies reveno al Rusio ĉi-somere tre vaste informis amaskomunkiloj. Post la tagmanĝo estis alia ekskurso – al la muzeo de Rimskij-Korsakov, kie Andrej Korobejnikov, juna esperantisto kaj tre talenta pianisto, gajninta jam multajn piankonkursojn, ricevis permeson iom ludi la pianon de la elstara komponisto. Vespere okazis jam granda piankoncerto de Andrej Korobejnikov en Tiĥvina muziklernejo (en tiu, kie estis registritaj tri unuaj diskoj el la serio “Oraj kantoj”), poste ĉiuj RET-partoprenantoj spektis en la urba kulturdomo spektaklon, preparitan de tiĥvinaj kanta ensemblo kaj teatro de modo laŭ la temoj de rusa popola festo de Ivan Kupala.

Necesas ankaŭ mencii, ke la esperantistoj havas signifan aŭtoritaton en Tiĥvin. Pro tio la aranĝo ne restis sen atento en la urbo. Al la solena inaŭguro venis la urbestro de Tiĥvin kaj la direktorino de la urba muziklernejo, kelkaj gazetoj publikigis dum la semajno informojn pri RET, kelkaj plej eminentaj esperantistoj estis invititaj al Tiĥvina televidstudio por “Ronda tablo”.

La tiĥvinaj esperantistoj sub senlaca gvido de Mikaelo Bronŝtejn denove pruvis, ke ili scipovas organizi nur bonegajn aranĝojn. Dankon al ili pro tio!

Garik Kokolija (Moskvo)

PEKINO – ĈINA KAJ ESPERANTISTA

Antaŭ jaro mi havis fortajn dubojn, ĉu mi veturu al Pekino por partopreni en la 89-a Universala Kongreso de Esperanto (la 24-31-an de julio 2004) aŭ ne. Mi ĉiam volonte partoprenas en UK-oj, sed ĉi-foje hezitigis longa vojaĝo, relative granda monelspezo, nekutimeco de la lando (mi ne ŝatas ekzotikaĵojn kaj turismaĵojn ĝenerale), prognozita somera varmo en Pekino (mi ne ŝatas varmon). Pro la samaj kialoj mi rezignis vojaĝon al Brazilo en 2002. Tamen ĉi-foje mi decidis veturi pro du poraj rezonoj. Unue, mi estas komitatano de UEA, kaj ĉi-jara komitatkunsido dum UK devis esti aparte grava, ĉar ni estis elektontaj novajn Prezidanton kaj Estraron de UEA (tio okazas unufoje dum tri jaroj). Due – ekzotikeco de la lando, najbara, sed tiomgrade alia. Jes, mi ne ŝatas ekzotikaĵojn, sed mi ŝatas postan eblon montri fotojn kaj fanfaroni “Mi estis tie”.

Do, mi akiris la vizon kun la bileto kaj “ekvojaĝis sentime”. Unue mi rakontu

pri la urbo mem, poste – pri la Kongreso. Pekino lasas tre bonan impreson. Tuj oni povas rimarki, ke preskaŭ ĉe ĉiu stratangulo staras unu aŭ du policistoj, kiuj draste diferencas de la niaj. Ĉinaj stratpolicistoj estas sveltaj junaj viroj, ili ne kontrolas ies dokumentojn, ne rigardas esplore la preterpasantojn, ne "vagadas sencele". Ili simple staras surloke, ĉiam pretas helpi, kaj tio donas senton de trankvileco kaj sekureco. Ĝenerale Pekino aspektas sufiĉe moderna urbo, kiu strebas doni al siaj gastoj ĉiujn oportunaĵojn. Ekzemple ĉinaj manĝoj evidentiĝis neplaĉaj por mi, post la unua provo mi komprenis, ke mi ne povos tion manĝi. Sed mi facile trovis apud la kongresejo picejon kaj "McDonalds", kiuj ofertis kutimajn por eŭropanoj manĝojn. Malfacilis ankaŭ komunikado kun ĉinoj-neesperantistoj, ne multe helpis (al tiuj, kiuj ĝin konas) eĉ la angla, ĉar malmultaj tie povas diri ion ajn en alia lingvo, ol la ĉina. Sed ne eblis ne rimarki, ke pekinanoj tre bone rilatas al fremduloj kaj ĉiam klopodas helpi, eĉ se ili ne komprenis kio estas bezonata.


dum ekskurso kun la ĉiĉeronino

Io simila estis ankaŭ en la kongresejo. LKK klopodis prepari junajn volontulojn por la Kongreso, ili estis multaj, kelkaj dekoj, eble eĉ pli ol cent. Ili komencis lerni Esperanton kelkajn monatojn antaŭ UK, ili deĵoris tra la tuta kongresejo. Kaj se iu kongresano haltis ie por kelkaj sekundoj, kaj sur la vizaĝo aperis dubo kaj necertemo, tuj al tiu venus iu junulo aŭ junulino kun speciala ŝildo kaj demandis: "Mi estas volontulo, ĉu mi povas helpi vin?". Sed ofte okazis, ke tiu frazo estis la sola, kiun ili povis eldiri en Esperanto. Kaj kiam la kongresano komencis klarigi sian bezonon, ili ofte ne povis kompreni, vokis kelkajn aliajn "helpantojn" kaj 3-4-ope provis traduki la demandojn. Tamen, se la kongresano havis toleremon aŭ bonŝancis kontakti pli-malpli E-parolantan helpanton, li ĉiam povis ricevi bezonatan helpon.

Ĝenerale en ĉi UK registriĝis iom pli ol 2000 personoj, proksimume duono el ili estis ĉinoj. La programo ege abundis kaj variis, kiel ĉiam. Pri kelkaj rezultoj de


la nova Estraro de UEA



Renato Corsetti

diversaj programeroj (nova Estraro, nova kotizo, Belartaj Konkursoj) vi povas legi en aliaj partoj de tiu ĉi numero.

Ĉefa intrigo en la kunsidoj de UEA-Komitato estis elektoj de la novaj Prezidanto kaj Estraro. Tion antaŭis kelkaj monatoj da preparaj aktivadoj, traktadoj, diskutoj. Finfine la sola kandidato por la prezidanta posteno evidentiĝis Renato Corsetti, kvankam lia agado en tiu posteno dum la antaŭa periodo al multaj ne plaĉis. La definitiva listo de kandidatoj por la Estraro dependis ankaŭ de tio, kiuj el la kandidatiĝintoj sukcesos fariĝi komitatanoj rezulte de la elektoj de B- (far individuaj membroj de UEA) aŭ C-komitatanoj (far A- kaj B-komitatanoj). Post la elektoj evidentiĝis, ke Ivo Osibov forfalis el la kandidata listo pro malsukceso dum la elekto de B-komitatanoj, sed Andrej Grigorjevskij, Renato Corsetti, Ulla Luin kaj Amri Wandel restis inter la estraraj kandidatoj, ĉar ili estis elektitaj kiel B- aŭ C-komitatanoj. Tiel por la sepmembra Estraro kandidatis ok personoj. Post la komitata voĉdono evidentiĝis, ke ĝuste Andrej iĝis superflua kandidato, ĉar por li voĉdonis nur 18 komitatanoj el 35.

El inter la ceteraj eventoj multe impresis la nacia vespero. Laŭ mi ĝi estis la plej interesa nacia koncerto, kiun mi iam ajn spektis dum Universalaj Kongresoj. Mirigis akrobatoj, kiuj faris siajn figurojn tenante en la manoj multajn stangetojn kun rotaciantaj teleroj supre; peco de spektaklo de pekina pantomima(!) opero; plej diversaj dancoj kun buntaj kostumoj kaj belegaj dekoracioj; lertaj prestidigitaĵoj; ĉarmaj kantoj. Neforgesebla estis ankaŭ la ekskurso al Granda ĉina muro kaj maŭzoleo de mezepoka ĉina imperiestro, kiuj konvinke atestis pri riĉa, longa kaj glora historio de la lando.



la Kongreson salutos infanoj, lernantaj E-on

Ne eblis ne rimarki ankaŭ la grandan atenton, kiun donis al UK la ĉina registaro. Al la kongresa inaŭguro venis vicestro de la ŝtata parlamento, pri paso de la kongreso multe informis amaskomunikiloj (mi mem spektis en televido intervjuon kun Humprey Tonkin). Kiam niaj busoj veturis al la ekskurso, ilin akompanis aŭtoj kun policistoj, ĉie dum la vojo la trafiko ĉe la vojkruciĝoj estis haltigata por ke la busoj veturu senhalte. La urbestra akcepto por la kongresanoj estis ne formala, kiel fojfoje okazis dum pasintaj kongresoj, sed vere altnivela kaj reprezenta.

Dum la aranĝoj "Centra Oficejo respondas" kaj "Nova Estraro de UEA sin prezentas" eblis ekscii interesajn detalojn pri la planoj kaj estonto de la Aso-

cio. Osmo Buller konfirmis, ke dum proksima estonto CO restos en Roterdamo, la domo estos renovigita, por kio estas destinitaj 300000 eŭroj el la mono de UEA. Krome, kaj la Estraro kaj CO-oficistoj konfirmis, ke nuntempe la interrilatoj inter ili estas bonaj, tial la konflikto, kiu kaŭzis demisiojn kaj krizon en UEA, estas elĉerpita.



transdono de la flago dum solena fermo

Vigle pasis la kongresa aŭkcio, lerte gvidita de Humprey Tonkin. Estis tie kelkaj interesaj kaj vere raraj libroj kaj esperantaĵoj, sed plej grandan intereson vokis (kiel ofte okazas) la kongresnumero 1 por la sekvajara UK en Vilno, kiu finfine estis vendita kontraŭ pli ol 200 eŭroj.

Al la solena fermo venis la urbestro de Vilno, kiu akceptis el manoj de la ĉinaj organizantoj la kongresan flagon. Ĝis revido en Litovio post unu jaro!

Garik Kokolija (Moskvo)

LA 40-aj BALTIAJ ESPERANTO-TAGOJ

La 10-18-an de julio 2004 en litova banurbo Birštonas apud ĉefa litovia rivero Nemunas okazis la tradiciaj 40-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj, kiujn organizis Litova Esperanto-Asocio. Tiuj ĉi tagoj okazas ĉiusomere laŭvice en Latvio, Estonio kaj Litovio ekde 1959. Estis kelkaj jaroj, kiam BET ne okazis. Ĉi-jare en BET-40 partoprenis 257 registritaj esperantistoj el 17 landoj, sed efektive la aranĝon entute partoprenis ĉirkaŭ 300 personoj, ĉar multaj litovaj esperantistoj venis nur por ambaŭ semajnfinoj kaj oficiale ne aliĝis al BET. Krome, estis kelkaj dekoj da aliĝintoj, kiuj reale ne venis (interalie el Francio, Ganao, Islando k.a.). Al la aranĝo salutmesaĝojn sendis tiutempa provizora prezidento de Litovio Arturas Paulauskas, prezidanto de UEA Renato Corsetti, ĝenerala direktoro de UEA Osmo Buller, nepo de Ludoviko Zamenhof Ludoviko Zaleski-Zamenhof. En la solena inaŭguro de BET-40 partoprenis kaj parolis vicurbestro de Birštonas Juozas Aleksandravičius, parlamentano esperantisto Stasys Kružinauskas, en la solena fermo de la aranĝo partoprenis kaj parolis urbestro de Birštonas Antanas Zenkevičius.

Programo de la aranĝo estis kutima: eblis aŭskulti multajn prelegojn en la somera universitato, enkadre de la aranĝo okazis diplomiga seminario de IEI gvidata de Atilio Orellana Rojas kaj Ana Montesinos; okazis ankaŭ vica Balta Esperanto-Forumo gvidata de Aleksander Korĵenkov kaj Halina Gorecka – oni povis aŭskulti kelkajn prelegojn pri la tradukita literaturo en Esperanto; estis tri grupoj de di-

versnivelaj Esperanto-kursoj, kiujn gvidis Sabina Trenner, Ewa Bondar, Nina Pietuchowska; Petras Čeliauskas ĉiutage prelegis pri la litova lingvo kaj literaturo, estis prezentita nova libro de “Sezonoj” “Ĉeriza ĝardeno”, okazis seminario pri problemoj de E-movado en Baltiaj landoj. Tre riĉa estis kultura programo de la aranĝo: ĉiuvespere okazis koncertoj de diversaj litovaj ensembloj, latva vespero, nacia kaj internacia vesperoj, estis aranĝita sankta Meso en Esperanto en loka katolika preĝejo, estis organizita ankaŭ ekumena diservo; okazis tre interesa tuttaga ekskurso per ŝipo al etnografia subĉiela muzeo en Rumsiskes, dum la tuta semajno funkciis riĉa libroservo, okazis kvizo pri E-movado, instruado de kantoj, kelkaj ekspozicioj (filatela de Marius Dyglys, fotoekspozicioj de Andrzej Sochacki kaj Ilona Ejsmont), renkontiĝo kun legantoj de “Litova stelo”; oni povis spekti kelkajn videofilmojn en Esperanto, okazis poezia vespero, ĉiumatene eblis gimnastiki laŭ jogomaniero, ĉiuvespere eblis distri sin en dancsalono, estis prezentitaj litovaj popolaj metioj, funkciis fotoservo.

Ĉiutage aperis kvarpaĝa grandformata gazeto “Meandro”, kiun redaktis Petras Čeliauskas kaj Choe Taesok. Pri la aranĝo vaste informis litova respublika kaj loka gazetaro, radioj, televidoj, novaĵagentejoj, retgazetoj. Estis filmitaj multaj aranĝoj por kvin regionaj litovaj televidoj. Al la gazetaro, radioj, televidoj, novaĵagentejoj antaŭ BET-40 estis dissendita ampleksa informo pri la aranĝo, multaj ĝin uzis. Fine de la aranĝo Litova Esperanto-Asocio donacis al urba publika biblioteko ĉirkaŭ 100 librojn en la litova lingvo kaj en Esperanto.

Geedzoj ĉeestas nuptofeston. La edzo drinkis jam kvar botelojn da vino. La edzino, maltrankviliĝante pri lia sanstato, memorigas al li:
– Vi jam ne plu povas tiom drinki. Rememoru, ke pasintsemajne vi pasis medicinan kontrolon, kaj la kardiologo permesis al vi trinki nur du botelojn da vino.
– Jes, vere, – respondas la edzo. – Sed mi ja poste estis ĉe terapiisto, kaj ankaŭ li permesis al mi trinki du botelojn.

(per-esperanto-humuro)

Dum la registriĝo ĉiu partoprenanto ricevis tre riĉan sakon (la programo de BET-40, speciala leterpapero, speciala koverto, speciala notlibreto, libreto pri Birštonas en Esperanto, broŝuro kun tekstoj de litovaj kantoj, broŝuro kun tekstoj por katolika diservo, turisma kolora eldonaĵo “Litovio. Jarmilo en Eŭropa centro”, turisma kolora eldonaĵo “Vilnius. Neforgesebla harmonio kaj ĉarmo”, Unua Bulteno de la 90-a UK en Vilnius en 2005, aliĝilo al UK en Vilnius, informa folieto de “La Ondo de Esperanto”, invito al BET-40). Estis farita speciala metala insigno de BET-40. Fine de la aranĝo ĉiu ricevis Adresaron de partoprenantoj de BET-40. Estis farita komuna foto de la partoprenantoj de BET-40.

Pli detale pri BET-40 eblas legi en la retejo de Litova Esperanto-Asocio <www.esperanto.lt> (la unua kaj dua informiloj, aliĝilo, litovlingva teksto por gazetaro, ĉiutaga programo de BET-40, ĉiuj sep numeroj de la gazeto “Meandro”, multaj fotoj k.s.). Organizan Komitaton de BET-40 gvidis Povilas Jegorovas.

(esper-inform)

ESPERANTISTA PRINTEMPO EN URALO

impresoj de la organizantoj

Kiel unu el la organizantoj de E-renkontiĝo "Esperantista Printempo en Uralo", mi havas plezuron informi, ke ĝi sukcese kaj interese pasis la 1-3-an de majo en la urbo Jekaterinburg kaj kunvenigis 64 registritajn partoprenantojn (plus kelkajn neregistritajn) el 20 urboj. La aranĝo celis kunigi E-junularon kaj malnovan esperantistaron de la regiono, havigi al ĉiuj plian okazon komunikiĝi Esperante, interŝanĝi spertojn, kune ripozi kaj amuziĝi en la etoso de sincera amikeco kaj ĝojo.

Sen pretendo esti detala en la priskribado de okazintaĵoj, mi povas nur diri, ke variaj kultur-klerigaj, lingvoplibonigaj kaj amuzaj programeroj bunte kolorigis la tritagan enhavon de la aranĝo. Ĉiuj partoprenintoj lernis per lecionoj el serio "Gutoj de lingvoscio", kiujn gvidis talenta instruisto V.Opletajev; interŝanĝis diversajn opiniojn dum diskuto pri idealistoj kaj realistoj en E-movado; ĝuis aŭtoran prezentadon de la nova romano de M.Bronŝtejn "Dek tagoj de kapitano Postnikov", kiu cetere tute kongruis kun la temo de la diskuto; partoprenis Amikan artan vesperon; plezure aŭskultis koncertojn de konataj en nia Esperantujo kanzonistoj M.Bronŝtejn kaj A.Radajev; ŝercis dum Humura vespero; ekskursis tra la urbo kaj eksterurben al monaĥejo "Ganina Jama"; festis la 25-jaran jubileon de Sverdlovska Esp-ista klubo; kantis kaj dancis en amika rondo; k.t.p.



Kiel pasintjare, dum la regiona renkontiĝo en Toboljsk, ankaŭ ĉifoje la partoprenintoj taksis ĉiun programeron de la renkontiĝo en speciale proponita Reflekta tabelo. Do, ĉiuj programeroj estis taksitaj inter 4 kaj 5 poentoj kaj la "Koncerto de M.Bronŝtejn" kaj "Ĝenerala etoso" de la renkontiĝo gajnis poentojn eĉ pli ol kvin. "Partopreno de M.Bronŝtejn, G.Kokolija, A.Radajev, V.Opletajev, A.Kalaŝnikov, D.Gadirova, K.Arbekova, T.Vŝivceva, G.Gazizov, V.Rozenberg, B.Ĉupin, M.Mamkin, F.Kasimov, aktiveco de ĉiuj kunvenintoj kreis tian medion – kvazaŭ mi vizitis ne uralan renkontiĝon por 3 tagoj, sed tutrusian por 10!" – skribis Rimma Roganova el la urbo Ĉusovoj.

Multaj postaj komentoj kaj opinioj pri la renkontiĝo atestas pri la neceso de tiuj eventoj, kiuj stimulas kaj entuziasmigas kaj nin organizantojn, kaj la partoprenintojn. Legu ilin, vidu la fotojn ĉe <http://www.komencanto.narod.ru>.

Viktor Kudrjavcev, estrarano de REU pri regiona agado

La tagoj de la renkontiĝo estis por mi, unu el la organizantoj, tre streĉaj, sed mirindaj tagoj, intense travivitaj. Mi povas nun konstati, ke fari ion komunan kun aliaj samideanoj estas sperto tre interesa kaj instrua. Tial mi estas tre danka al ĉiuj, kun kiuj mi kunlaboris en la organizado de tiu ĉi renkontiĝo. Unue, mi estas dankema al miaj samurbanoj V.Terjoĥin, V.Kudrjavcev, O.Gavrilova, T.Kulakova,



N.Talankina, V.Kulakov, kiuj akorde aranĝis ĉion surloke. Mi estas dankema al la spertaj regionaj esperantistoj: D.Gadirova, A.Kalaŝnikov, V.Opletajev, T.Vŝivceva, kun kiuj min denove proksimigis la renkontiĝaj tagoj kaj kiuj aktive partoprenis kaj gvidis programerojn de la renkontiĝo. Kaj certe mi estas danka al gastoj el foraj urboj – personoj neordinaraj, vere interesaj, spritaj, muzikemaj: M.Bronŝtejn, G.Kokolija, A.Radajev, kiuj iĝis inspiriga forto de la aranĝo kaj multe kontribuis al tio, ke la renkontiĝo pasis kun granda entuziasmo.

La organizantoj, konsiderante tion, ke oni kutime venas en renkontiĝon por amikiĝi, lerni, amuziĝi, de la komenco penis foriri de enuaj programeroj, pezaj movadaj debatoj kaj laborkunsidoj kaj krei festan etoson de amika interkomunikado. Ŝajnas, ke neniu enuis. Rimarkinda aspekto de tiu ĉi renkontiĝo estis partopreno de sufiĉe granda nombro de gejunuloj, afero tre ĝojiga por niaj koroj. E-junularo kaj malnova esperantistaro bone integriĝis, kaj novlernintoj, multaj el kiuj timeme sin kaŝis dekomence, iom post iom eniris en la medion kaj sentis sin pli kuraĝe. Estis agrable vidi, kiel dum Humura vespero elpaŝis per skeĉoj kaj teatraĵetoj spontane kreiĝintaj grupetoj de esperantistoj el diversaj urboj, kaj la spertuloj helpis kaj kuraĝigis al elpaŝo gejunulojn. Ni esperas, ke la renkontiĝo puŝos novulojn al progreso kaj kredas, ke impresoj, ricevitaj dum la renkontiĝo, firmigos ĉe ili senton, ke Esperantujo estas pli vasta ol nur lingvokurso, kaj instigos ilin engaĝiĝi en aktivan E-movadon.

Raja Kudrjavceva (Jekaterinburg)

Galina Sarapulova, Tjumenj: Al mi plaĉis multo: organizo de renkonto, ekskursoj, amika etoso, gaja kaj ĝoja; ankaŭ mi ekkonis multajn famajn homojn; certe montoj kaj arbaro, suna kaj varma vetero, multe da kantoj kaj ŝercoj.

Bronislav Ĉupin, Iĵevsk: Ĉio estis organizita tre bone! Bonege! Vi estas gebravuloj!

Katerina Arbekova, Novosibirsk: Mi estis ravita de la etoso. Al mi plaĉis ĉio. Brilaj homoj partoprenis tiun ĉi renkontiĝon, kaj mi estas ĝoja, ke mi partoprenis ĝin! Daŭrigu labori por E-to kaj estu feliĉaj!

Tatjana Vŝivceva, Miass: Mi planis renkonti la malnovajn amikojn kaj konatojn kaj ĝui E-etoson. Ŝajnas, ĉio realiĝis.

Dilara Gadirova, Tobolsk: Ne vizitinte E-aranĝojn dum deko da jaroj, mi denove malkovris Esperantujon. Ĝi estas vizitinda kaj admirinda.

Mansur Mamkin, Tjumenj: Tiel bone mi jam delonge min ne sentis... Dankon pro bonega organizado kaj preparado.

INTERNACIA ESPERANTO-RENKONTIĜO EN ARMENIO

La 18-24-an de junio 2004 en Armenio okazis Internacia Esperanto-Renkontiĝo, dediĉita al la 100-jara jubileo de la eminenta reprezentanto de Armenia E-movado, Akademiano de la Akademio de Sciencoj de Armenio, Akademiano de la Akademio de Esperanto Gurgen Sevak. La Renkontiĝon partoprenis geesperantistoj el Irano (11 partoprenantoj), Kartvelio (3), Pollando (1) kaj Armenio (pli ol 50). Enkadre de la Renkontiĝo okazis la konferenco "Gurgen Sevak kaj E-movado en Armenio", prelegoj, diskutoj, paroliga kurso, koncertoj, instruado de kantoj, Esperantaj ludoj, amuzvesperoj.

La Renkontiĝo estis projektita tiel, ke la seriozaj kaj amuzaj aranĝoj estu kombinitaj. La partoprenantoj povis ekskursi, viziti vidindajn lokojn kaj serioze labori, ĝuante belecon de la armena naturo. Ĉiutage, post matenmanĝo en la hotelo, la partoprenantoj per du busetoj veturis eksterurben (Oŝakan, lago Sevan, Garni, Geghard, Arzni, Eĉmiatsin, Bĵni), kie ili havis ekskursojn gviditajn de armenaj esperantistoj, kaj poste, en la sino de la naturo, estis efektivigitaj la aliaj punktoj de la programo por tiu tago.

Dum la Renkontiĝo estis prezentitaj prelegoj: Vivo kaj agado de Akademiano Gurgen Sevak (Jerĝanik Gevorgjan); Armenia Esperanto-movado (Lida Elbakjan); La agado de AEA (Karine Arakeljan); Esperanto-movado en Kartvelio (Nana Ĥizambareli); Esperanto-movado en Irano (Reza Torabi); Esperanto-movado en Pollando (Maciej Wnuk). Okazis diskutoj: Plivigligo de la kunlaboro inter la Esperanto-Asocioj en la regiono; Interŝanĝo de esperantistaj grupoj; Kunlaboro sur la kampo de instruado, turismo, komerco. Araksja (Inna) Elbakjan gvidis E-kursojn por komencantoj, organizis lingvajn ludojn kaj instruis Esperantajn kantojn.

Ĉe bordo de la lago Sevan okazis neforgesebla internacia koncerto, kaj longe sonis en la kristale pura aero de la perlo de Armena montolando armenaj, kartvelaj, persaj, polaj, rusaj kaj alipopolaj kantoj en naciaj lingvoj kaj en Esperanto.

Estis organizita ekskursa veturado tra la urbo Erevan kun vizito al la Instituto de Antikvaj Manuskriptoj Matenadaran, taga kaj vespera promenado en la ĉefurbo, vizito al la suvenira bazaro.



La partoprenantoj ankaŭ ĝuis Esperanto-programon en la Infanĝardeno, kies direktorino (Knarik

Davtjan) kaj edukistino estas esperantistinoj – membroj de AEA.

La lastan vesperon la partoprenantoj de la Renkontiĝo estis akceptitaj en la Centra E-klubo en la Domo de Amikeco. Dum la vespero la Irana pentristo-esperantisto s-ro Morteza Habibpur prezentis pere de lumbildoj unikajn speci-menojn de sia arto. Armenaj esperantistoj prezentis teatraĵeton – la faman fabelon verkitan de Hovhannes Tumanjan "La morto de Kikos", donacinte al la spektantoj kelkajn minutojn da rido kaj gaja humoro.

Venis la plej kortuŝaj momentoj de la Renkontiĝo – la solena fermo kaj inter-ŝanĝo de suveniroj. Kaj kiel la lasta akordo de tiu bela simfonio de amikeco kaj in-terkompreno, ĉiuj ĉeestantoj estis invititaj flanke de la iranaj gesamideanoj al la liberaera kafejo, kie ili gustumis famajn iranajn dolĉaĵojn kaj frandaĵojn.

Kvankan la sekvanta adiaŭa mateno emociigis kaj malgajigis ĉiujn, tamen en la koroj restis certeco pri tio, ke komenciĝas nova erao en la historio de la regiona Esperanto-movado, kaj ke la semoj plantitaj dum IER en Armenio nepre alportos bonajn fruktojn!



La laboro de la Internacia Renkontiĝo jam estis prezentita en la speciala televida programo (la 1-an de julio), aperis ankaŭ artikolo en la armenlingva revuo "La naŭa mirindaĵo". Armenia E-Asocio dankas ĉiujn organizantojn kaj partoprenantojn de la Renkontiĝo pro la perfekta, senlaca laboro.

Specialan dankon ni volas esprimi: al la grupoj el Irano, Kartvelio kaj Pollando kaj iliajn gvidantojn s-ron Reza Torabi, s-inon Nana Ĥizambareli kaj s-ron Maciej Wnuk pro la aktiva partopreno kaj valora kontribuo al la grava afero de evoluigo de la regiona E-movado; al s-ro David Amirjan, la nepo de Gurgen Sevak, pro la materiala kaj spirita subteno dum la organizado de la Renkontiĝo; al la membroj de la turisma sekcio sub gvidado de s-ro Levon Hakobjan pro la brila organizado de eksterurbaj sesioj de la Renkontiĝo.

Ĉe la adresoj <www.iera1.sabzandishan.org>, <www.iera2.sabzandishan.org> kaj <www.iera3.sabzandishan.org> oni povas vidi fotojn pri la renkontiĝo:.

Lida Elbakjan, Prezidantino de Armenia E-Asocio
Karine Arakeljan, Vicprezidantino de Armenia E-Asocio

LA PLEJ BONA…


Armenio invitas karajn gastojn

… E-aranĝo en mia vivo estis (kaj por ĉiam restos) mia unua OkSEJT. Similan aserton povas fari preskaŭ ĉiu ekssovetia esperantisto, kies E-staĝo superas 10 jarojn.

Por kompreni tion, unue necesas kompreni, kion ĝenerale signifis OkSEJT (verŝajne same estis pri OrSEJT, sed mi neniam ĝin partoprenis) en la vivo de multaj sovetiaj esperantistoj. Post longa jaro da rutina vivo kun teda kaj ofte ne ŝatata laboro, kun gazetoj kaj televido, en kiuj eterne dominis perfektaj agoj de Sovetia Ŝtato kaj Komunista Partio, kun produktoj, vestaĵoj kaj libroj, kiujn oni devis unue bonŝance trovi kaj nur poste aĉeti (se ankoraŭ ne finiĝis la mono ricevita la 5-an aŭ la 20-an de ĉiu monato), kun malfacila komunikado inter la geamikoj (Interreto kaj poŝtelefonoj ne ekzistis, interurba telefonado estis problema, multaj eĉ ne havis telefonojn hejme, leteroj vojaĝis dum semajnoj), post ĉio ĉi la homo venas al la sopirata OkSEJT. Kaj por dek tagoj (se inkludi paroligan periodon – por dekkelkaj) li unue forgesas pri ĉio listigita en la antaŭa frazo, due – mergiĝas en tute alian atmosferon. Ĉi tie la homo povis ne ŝajnigi intereson al io tute malplaĉa, sed okupiĝi pri tio, kion li vere ŝatis. Ĉi tie neniu diradis al li "vi estas netaŭga, vi nenion scipovas", sed "provu fari tion, vi sukcesos". Ĉi tie se iu eraris, neniu mokis lin, sed male – ĉiuj strebis helpi. OkSEJT estis kvazaŭ dek tagoj da freŝa aero. Ofte ĝi donis fortojn por la longa jaro ĝis sekva tendaro.

Kaj tio plej forte impresis ĝuste dum la unua fojo, en la unua tendaro. Impresis ĉio: hazardaj renkontiĝoj kun samideanoj en aviadilo, trajno aŭ buso jam survoje al la tendaro; la inaŭguro kun multaj salutoj, donacoj kaj bonkoraj vortoj; nura Esperanta parolado tage kaj nokte kaj kaŭzita de tio rapida perfektiĝo en la lingvo; matenaj kunvenoj kun verda policisto, amuzaj krokodilaĵoj kaj prifajfo de la krokodiloj; la plej diversaj prelegoj kaj diskutoj; matenmanĝoj, tagmanĝoj kaj vespermanĝoj en amika medio; gajaj sportaĵoj sen ajna ĝeno; konkursoj, unuavice – KGS; vesperaj koncertoj, por kiuj oni devis anticipe okupi bonajn lokojn en la halo; vesperaj kaj noktaj enĉambraj babiladoj, kun la "libroj" kaj sen tiuj; la noktaj lignofajroj, grandaj kaj multnombraj, kun la komunaj kantoj,


ĉe la tombo de Gurgen Sevak

kiuj tre rave sonis sub stelplena ĉielo apud ardanta flamo; la adiaŭo kun nepra amika rondo, “Ni renkontiĝos”, kisoj kaj larmoj.



Boris Kolker, Irina Gonĉarova kaj Susanna Maĉkalova

Por mi la unua tendaro estis OkSEJT-26, kiu okazis en 1984 en Agveran (montara loko en Armenio apud Erevan). Ĝuste por omaĝi la 20-jaran datrevenon de tiu evento mi skribas ĉion ĉi. La tendaro estis unika, ne nur pro tio, ke ĝi estis mia unua tendaro. Tio estis la sola SEJT, kiu okazis en Transkaŭkazio. Do, la plej popularan kaj bonetosan sovetian E-aranĝon akceptis la plej gastamaj mastroj. La rezulto estis mirakla kaj neforgesebla, tion povas konfirmi verŝajne ĉiuj partoprenintoj.

Ne eblas supertaksi la klopodojn de armenaj geesperantistoj, kiuj faris ĉion eblan kaj neeblan por sukceso de la tendaro. Mi memoras vin ĉiujn, karaj geamikoj: Avetis, Susanna, Aruŝan, Inna, Lida, Guĉo, Armine, Tom, Karina… Mi volas ankoraŭfoje, post dudek jaroj, diri al vi “Dankon!”.


eĉ dum la subĉielaj koncertoj ne sufiĉis sidlokoj, kelkaj devis stari

Kaj ne nur al vi. Estis ankaŭ multaj aliaj geesperantistoj el diversaj sovetiaj respublikoj, kiuj faris nian esperantistan vivon multkolora, interesa kaj neforgesebla: Nana, Avto, Aljbert, Dato, Dace, Ŝaik, Levan, Firdaus, Sigis… Dankon! Mi memoras kaj amas vin ĉiujn!

Eble niaj nunaj rusiaj amasaj aranĝoj ĝuste pro tio ne kompareblas kun la iamaj sovetiaj OkSEJT-oj, ke en ili ne plu partoprenas (krom maloftaj esceptoj) armenoj, latvoj, kartveloj, ukrainoj, uzbekoj, litovoj, belorusoj, kazaĥoj, azerbajĝananoj, estonoj, taĝikoj…

Mi konscias, ke tiu tempo, tiu E-amikaro kaj tiuj tendaroj neniam ripetiĝos, sed la fakto, ke ili estis en mia vivo, faras ĝin iom pli bela kaj iom malpli vana (mi rajtas paroli nur pri mi, sed mi certas ke multaj sentas la samon).

Garik Kokolija (Moskvo)

Bulteno de REU

VLADIMIR SAMODAJ IĜIS HONORA MEMBRO DE UEA!

La Komitato de UEA en sia kunsido dum UK en Pekino honoris kelkajn esperantistojn per la titolo de Honora Membro aŭ membro de la Honora Patrona Komitato. Kiel membro de la Honora Patrona Komitato estis elektita la eksprezidanto de UEA, **Kep Enderby**, iama ministro pri justico en Aŭstralio. Honoraj Membroj iĝis la elstara ĉina esperantisto **Li Shijun (Laŭlum)**, la rusia aktivulo, eksa prezidanto de Sovetrespublikara Esperantista Unio **Vladimir Samodaj**, la iama Konstanta Kongresa Sekretario de UEA **Gian Carlo Fighiera** (Italio), la unua prezidanto de KAEM (Komisiono pri Azia Esperanto-movado de UEA) **Takeuti Josikazu** (Japanio), la eksprezidanto de UEA **Lee Chong Yeong** (Koreio), la pedagogo **Maria Saturova-Seppova** (Slovakio) kaj la blindula aktivulo **Jiri Vychodil** (Ĉeĥio).

(Libera folio)

NOVA ESTRARO DE UEA

En Pekino estis elektita ankaŭ nova Estraro de UEA por la periodo 2004-2007: **Renato Corsetti** (Italio) – prezidanto; planado, eksteraj rilatoj, informado; **Claude Nourmont** (Luksemburgio/Francio) – vicprezidanto; kulturo, kongresoj; **Ulla Luin** (Svedio) – ĝenerala sekretario; **Ans Bakker-ten Hagen** (Nederlando) – financoj, administrado, rilatoj kun TEJO; **Yu Tao** (Ĉinio) – azia agado, amikoj de Esperanto; **Maritza Gutiérrez Gonzáles** (Kubo) – landa agado; **Amri Wandel** (Israelo) – faka kaj scienca agado. La unuan fojon en la historio de UEA plimulto de la estraranoj estas virinoj.

SLAVIK IVANOV IĜIS UEA-KOMITATANO

Entute 1491 individuaj membroj de UEA uzis ĝustatempe sian rajton voĉdoni en la plej grandskala regula referendumo de la Esperanto-komunumo por elekti ses Komitatanojn B de UEA por la periodo 2004-2007. El 5140 dissenditaj balotiloj revenis 29,0%. Sekve la balot-aktiveco restis iom sub tiu en 2001, kiam ĝi estis 31,4%. La voĉoj estis nombritaj en la Centra Oficejo la 1-an de julio. Plej multe da voĉoj rikoltis István Ertl (Belgio), eksredaktoro de la revuo “Esperanto”. Kun 882 voĉoj li ankaŭ estis la sola kandidato, kiun apogis plimulto de la balotintoj. Aliaj sukcesaj kandidatoj estis Amri Wandel (Israelo) kun 720 voĉoj, Marija Belošević (Kroatio) kun 605, Lee Chong-Yeong (Korea Resp.) kun 602, Jukka Pietiläinen (Finnlando) kun 565 kaj Slavik Ivanov (Rusio) kun 546 voĉoj. Wandel, Belošević kaj Lee membris ankaŭ en la antaŭa konsisto de la Komitato, dum Ertl, Pietiläinen kaj Ivanov eniros la superan organon de UEA kiel novaj membroj. La 26-jara Ivanov estas de longe la plej juna kandidato, kiu sukcese trairis la balot-elprovon de la membraro de UEA. La averaĝa aĝo de la elektitoj estas 44 jaroj. La ceteraj kandidatoj ricevis voĉojn jene: Yves Bellefeuille 535, Chuck Smith 534, Wu Guo-

jiang 525, Hokan Lundberg 480, Jose Antonio Vergara 450, Philippe Chavignon 422, Choi Yunhuy (Hortensio) 419, Ivo Osibov 359, Diccon Masterman 347 kaj Francisko Simonnet 233. Estis entute 1485 validaj kaj 6 malvalidaj balotiloj.

(Gazetaraj komunikoj de UEA, № 183)

NOVAJ REU ALIĜOJ POR 2004

ALIĜINTAJ KOLEKTIVOJ

Ivanova Medicina Esperanta Asocio (IMEA) (+3 aligitaj membroj): *Ĉestnov Aleksej, Koĉetkova Marija, Saĥarov Aleksandr*

Moskva EK MASI (+2 aligitaj membroj): *Gurskaja Oljga, Ŝvedov Kirill*

INDIVIDUAJ MEMBROJ

Derjugin Aleksandr (Saratov), Kopajev Jurij (Orjola reg.), Maleĵ Ljubovj (Ivanovo), Melnikov Aleksandr (Rostov-na-Donu), Sokolova Evelina (Krasnojarsk), Vronskij Dmitrij (Volgograd)

FAMILIA MEMBRO

Karapetjan Rustam (Krasnojarsk)

Dum sia kunsido en Pekino la Komitato de UEA aprobis plialtigon de la baza membrokotizo por 2005 de 54 al 55 eŭroj. Tio signifas ke la koncerna kotizo por rusianoj (MA – membro-abonanto kun "Esperanto") altiĝos de 27 al 27.5 eŭroj.

REU-KOTIZOJ POR LA JARO 2004

50 rubloj (por eksterrusianoj – 5 eŭroj) – ***individua kotizo*** (la membrokarto, Jarlibro de REU, REU-bulteno kaj aliaj informoj de REU, voĉdonrajto en REU-Konferenco, rabatoj ĉe uzo de REU-servoj kaj en E-aranĝoj);

1250 rub. (por eksterrusianoj – 125 eŭroj) – ***dumviva kotizo*** (ĉio la sama dum la tuta vivo);

25 rub. – ***familia kotizo*** (la membrokarto, voĉdonrajto en REU-Konferenco, rabatoj ĉe uzo de REU-servoj kaj en E-aranĝoj);

100 rub. + 25 rub. por ĉiu aligita membro (ne malpli ol 5; krom individuaj membroj de REU) – ***kolektiva kotizo*** (po 1 ekzemplero de REGo kaj Jarlibro de REU por ĉiu komenciĝinta deko de la aligitaj membroj, aliaj informoj de REU por la kolektivo; la membrokartoj, voĉdonrajtoj en REU-Konferenco, rabatoj ĉe uzo de REU-servoj kaj en E-aranĝoj por la aligitaj membroj).

La rabatita abono de REGo por ajna individua membro de REU (inkluzive la dumvivajn kaj familiajn, sed ne por la aligitaj) en 2004 kostos 100 rublojn (por la eksterrusianoj – 12 eŭrojn). La dumvivaj membroj, kiuj pagis sian kotizon en 2001-2003 (kaj tial ilia kotizo enhavis la koston de REGo), plu ricevados REGon sen aldona pago. Aliaj dumvivaj membroj (kies kotizo ne inkludis la koston de REGo) por ricevi la gazeton devos pagi ĉiujare la rabatitan abonkoston.

La rublaj kotizoj sendendas al: Чертилову Михаилу Константиновичу, а/я 21, Одинцово-6, 143006 Московская обл.; la eŭraj kotizoj pagendas al la konto reua-p ĉe UEA.

REJM-info

Jen, la afero, pri kiu ni parolis dum pli ol duonjaro – IJK-60 – okazis! Plena statistiko de la aranĝo estas jena – partoprenis 355 personoj el 27 landoj: Rusio – 234, Svedio, Germanio – po 13, Francio – 12, Ukrainio – 11, Danio, Hispanio, Pollando – po 8, Italio – 6, Kroatio – 5, Nederlando, Norvegio – po 4, Kazaĥio, Aŭstrio, Hungario – po 3, Bosnio kaj Hercegovino, Portugalio, Usono, Britio, Irano, Belorusio, Moldavio, Taĝikio – po 2, Slovakio, Kanado, Ĉinio, Finnlando – po 1. La aranĝo estis vere bunta kaj multflanka, kutime samtempe pasis po 3 aŭ pli da programeroj, estis tutkongresaj koncertoj kaj festoj, kaj ĉiu povis trovi por si ion interesan. Ne eblas ĉion vere priskribi per vortoj, kaj ni volas prezenti al vi emociajn impresojn de partoprenanto.



la geprincoj de IJK

VI DEMANDIS, KAJ MI RAKONTAS

Do, la 60-a Internacia Junulara Kongreso sukcesis. Kaj mi povas ekkrii inter pli ol 350 partoprenantoj – "Hura! Estis bonege! TRE BONEGE!". Oĥ, mi ne forgesos specialan etoson de IJK: kvazaŭ en aero estis disigita boneco, amikeco kaj amo.

Verŝajne vi ne tre miros, se mi diros ke mi eksciis multon novan pri moroj kaj kulturoj de fremdaj landoj, ke mi havas nun ankoraŭ pli da novaj amikoj; jes, vi povas ne miri – tio estas "kutima" miraklo de Esperanto: proksimigi homojn kaj fari ilin feliĉaj.

Sed min certe impresis ankaŭ miaj malnovaj geamikoj – ĉeboksaranoj. Ja certe multegis vicoj de miaj eltrovoj. Dankegon miaj karaj: vi estas bonegaj!

Mi volus rakonti pri diversaj aranĝoj, sed ili estis tiom multaj, ke ne eblis pli multaj, jes, tiel ke mi ne volis dormi, nur komunikiĝi kun novaj amikoj. Mi timis



la italoj aldonis spicon al la etoso de IJK

preterlasi ion interesan.

Miajn sentojn estas malfacile priskribi. Simple – estas tre bone, ke ekzistas Esperanto-movado, kaj ĝi ne estas simpla parto de mia vivo: Esperanto estas parto de mia mondpercepto.

Tanja Tolstova (Ĉeboksari)

La 5-10-an de julio apud Kovrov pasis OkSEJT-44, kiu ĉi-jare estis speciale dediĉita al instruado kaj preparado de IJK. Entute regsitriĝis 57 personoj, inter kiuj estis 2 kroatoj kaj po 1 persono el Belorusio, Germanio, Italio kaj Kazaĥio. El Rusio estis reprezentantoj de Ĉeboksari, Jelec, Kostroma, Kovrov, Krasnojarsk, Moskvo, Niĵnij Novgorod, Rostov-na-Donu, Samara, Sankt-Peterburg, Soĉi, Tomsk, Volgograd k.a.

OkSEJT – INSTRUADO SEN TEDADO

Se vi venus al OkSEJT ĉi-jare kaj hazarde trafus antaŭtagmezan tempon, vi tuj rimarkus kvietan silenton kaj mankon de homoj surstrate: ĉiuj estis en E-lecionoj, kiuj pasis samtempe en 4 lokoj kaj en 3 lingvoniveloj. Kiel evidentiĝis, la plej amasa grupo estis progresantoj, kiuj konsistigis 2 grupojn – de Oleg Izjumenko kaj de Lena Melnikova; iom malpli granda estis grupo de daŭrigantoj, kiujn gvidis Britta Loose kaj Aleksej Besĉastnov, kaj la plej malgranda estis grupo de komencantoj, gvidata de Kostik Gornij.



"Perdita Generacio" – koncerto dum IJK

Tuj post la tagmanĝo ĉiutage komenciĝis programeroj, dediĉitaj al preparado de IJK: unu grupo preparis rusan dancon por la malfermo kaj la dua – lernis rusajn ludojn kaj facilajn dancojn por rusa foiro. Kaj jen post tiu "rusa" paŭzo denove komenciĝis E-instruado. Entute la kursoj pasis 3-foje tage po 2 horoj. Vespera programo ankaŭ parte estis instrua kaj movadeca – ĉiutage okazis tiel nomataj "Movadaj paroloj", kie oni en libera formo konversaciis pri ideoj de E-movado, pri E-organizoj, aranĝoj, pri evoluo de la movado, pri lingvoj ĝenerale. Kaj nokte krom ludi oni ankaŭ lernis E-kantojn kaj spektis instruan animacifilmon "Mazi en Gondolando". Necesas diri ke oni strebis multe paroli en E-to, kaj kelkaj novuloj eĉ diris ke por ili estas iusence "lingva ŝoko".

La lasta tago de OkSEJT pasis nekutime trankvile, sen tradiciaj adiaŭoj, ĉar ĉiu havis senton ke nenio finiĝas, sed male – komenciĝas ankoraŭ unu granda kaj interesa aranĝo. Kaj sekvamatene ĉiuj OkSEJT-anoj jam registriĝis en IJK…

Konstantin Viĥrov (Ĉeboksari)

Ĉi IJK ankaŭ estis riĉa je antaŭ- kaj postkongresoj, kaj jen estas informoj pri tio.

NI SEMIS MAK-on, KIO ELKRESKIS?

impresoj de la organizantoj

– Hej, ĉu ni faru MAK-on?

Kiam mi alvokis homojn okazigi tiun aranĝon, mi vere eĉ ne povis imagi, kio estos. Kian renkontiĝon ni vere volas: ĉu amuzan, ĉu turisman, ĉu movadan? Mi certis nur, ke mi volas Antaŭkongreson en Moskvo.

Aperis la homoj, kiuj same kiel mi deziris labori kaj fari la renkontiĝon antaŭ IJK. Kaj tuj reveninte el Germanio post IS ni komencis... unue pridiskuti kion ni faros, kaj kiu okupiĝu pri kio.

Tiam, en januaro, mi eĉ ne konsciis ĝis la fino, kiaj brilaj homoj vivas ĉirkaŭ mi, kaj ke ni vere ĝisvivos la komencon de MAK, laborante kune dum duonjaro por unu projekto. Tio iĝis, reale, la afero, farita de junaj membroj de moskva klubo kun morala subteno de nia instruistino, amikino, la sperta Irina Gonĉarova.



Unuafoje en mia vivo mi iĝis kunordiganto de projekto. Grava posteno, ĉu ne? Sed vere mi nenion sciis, kion mi devas fari: kiel motivigi la homojn, kiel interesigi ilin.

Dank' al MAK nun ni havas propran paĝon <www.moskvo.ru>, faritan de Onjo (Oljga Ĉerniŝova). Post la ferioj ĝi ne mortos, sed iĝos la scenejo por montri MAK-on, fotitan de partoprenintoj. Tien ni planas enmeti amuzajn rakontetojn de niaj gastoj, intervjuojn kaj multon alian pri Moskvo. El tiu ĉi paĝo kreskas nun propra paĝo de EK MASI kaj aliaj retprojektoj. Kaj ni ĉiam bonvenigas kunlaborantojn. Dank' al MAK programrespondeculoj Ora (Viktorija Morozova) kaj Benita (Alla Kudrjaŝova) nun povas labori kiel grup- kaj ekskursgvidantoj tra taga kaj nokta Moskvo, inkluzive ĉiujn muzeojn kaj noktajn klubojn. Dank' al MAK ni starigis multajn kontaktojn, kaj Svetlana Gonĉarova, kiu okupiĝis pri kontaktoj enkadre de la organiza teamo, neniam antaŭe, ŝajnas al mi, kreis tiom multe da demandaroj. Mi mem nun ne timas okupiĝi eĉ pri financoj kaj pretas denove kunordigi la projektojn, kiujn ni jam pridiskutas. Ĉu vi havas ideojn? Tiam skribu al ni: <mak2004@mail.ru>.

Verŝajne mi devas dividi sperton. Indas diri nur unu aĵon, ĉio cetera dependas

de ĝi. La plej grava afero, laŭ mi, dum organizado de aranĝo estas la teamo. La teamano devas ĝuste scii, pri kio li/ŝi okupiĝas, kie estas la komenco kaj kie estas la fino de lia/ŝia laborkampo, kaj okupiĝi nur pri tio. Se la laborkampoj miksiĝas, nenio utila rezultas en la afero. Kaj la tasko de kunordiganto: "esti ĉie" kaj helpi al ĉiuj, se io malklaras aŭ dependas de li/ŝi. En nia kazo mia entrudiĝo tute ne bezonatis. Dankon al homoj, kiuj ne estis en OT, sed multege helpis – renkonti, grupgvidi, akompani, eĉ en saŭno kaj en nokta klubo. Dankon al Fluganta kaj Andrej, dankon al Libera kaj Junas, dankon al Svetlana Smetanina kaj Kirill, dankon al Rusia scienc-esplora instituto de kultura kaj natura heredaĵo. Pardonu, se mi iun forgesis nomi.

Nun mi konscias, ke nur praktikaj aferoj spertigas!

Valentina Sidorova (Grimpi)

Kiam mi skribis ankoraŭ en la retpaĝo en sinprezento, ke dum MAK mi malkovros kelkajn misterojn pri mia amata urbo kaj planas ekscii multon novan kun niaj partoprenantoj, mi tute ne ŝercis. Antaŭ tiu aranĝo mi sufiĉe malbone konis mian urbon, kaj ekzistis kazoj, kiam mi tute ne kapablis moviĝi sen urbomapo. Tiom da stratoj en Moskvo… estas tute facile perdiĝi. Post la periodo de ĉeestado de eksterlandanoj ĉi tie, tio preskaŭ malaperis.



Dum MAK al ĉiuj estis disdonitaj specialaj programlistoj, kie ili povis elekti la programerojn, kiujn la OT proponis al ili. Kiam ni rericevis tiujn listojn reen kaj komencis analizi ilin, mi estis ege surprizita, ĉar ekz. por la ekskurso al muzeo de Lomakov (raraj aŭtoj) neniu, imagu, NENIU VOLIS ALIĜI. Ĉu plimulto da viroj ne ŝategas aŭtojn? Estis surprizo ne nur por mi, sed por ĉiuj teamanoj. Mi volas doni etan statistikon: 70% da homoj deziras viziti tiun muzeon, kiam ili ekscias pri ĝia ekzisto en Moskvo. Por komparo – la Ruĝan placon kaj Kremlon ŝatus viziti 72%, la Grandan teatron – 27%, la Galerion de Tretjakov – 37% el eksterlandaj gastoj. Kiel oni diras en Rusio – fremda kapo estas mallumo.

Viktorija Morozova (Ora)

Nia antaŭkongreso celis diversflanke montri la rusian ĉefurbon kaj ĝenerele konatigi homojn kun la vivo en tiu ekzotika lando, kia estas Rusio por plejparto de eksterlandanoj. Preskaŭ ĉiuj estis en Rusio unuafoje, do nia respondeco estis grandega. Aliĝis 32 personoj, venis ĉiuj ricevintaj la vizojn, kvante 29. Ĉiuj estis renkontitaj en flughaveno/stacidomo, enloĝigitaj en hotelon, de kie niaj gastoj



matene startis por bus- aŭ ŝip-ekskursi, piedpromeni, viziti muzejojn, partopreni en tea ceremonio, danci en nokta klubo, saŭnumi kaj, kompreneble, multe gustumi rusajn manĝaĵojn kaj trinkaĵojn, foti kaj aĉeti suvenirojn.

Malgraŭ kelkaj streĉaj okazoj kaj "migrakartaj" historietoj, mi opinias, ke la organizado estis bona. Mi ŝatus rimarki ke preskaŭ ĉiuj organizantoj de la Antaŭkongreso estis nespertaj pri tio kaj MAK fakte estis nia "unua krespo". Mi kredas, ke ne "bulo". Tion parte pruvas la rakontoj de niaj karaj gastoj. Vidu sube.

Mi dankas ĉiujn, kiu helpis nin, kunlaboris, estis niaj konsilistoj kaj moralsubtenantoj. Ĉiam bonvenon al Moskvo! Ĝis revido!

Alla Kudrjaŝova (Benita)

Mi alvenis Moskven marde, la 6-an de julio, kaj jam en la hotelo ekkonsciis ke mi estas en Rusio. Mankis varma akvo! Tial post malfermo de MAK kaj enketado pri programeroj, kiujn mi ŝatus partopreni, mi iris malfrue vespere al saŭno, afable mendita de la organizantoj. Matene aŭtobuso atendis nin por komuna eksurso al la plej interesaj kaj konataj vidindaĵoj. Tage mi vizitis Muzeon de Kosmo, kiu estis interesega. Al vespera promenado ĉe Tutrusia ekspozicia centro kaj Ostankino bonŝancis vetero kaj inteligentaj gvidantoj. Ĵaude denove estis matene muzeo, de Majakovskij, mi tre ŝatis gin, tage – eksurso al la parko Kolomenskoje kun riĉa historia pejzaĝo, vespere mi partoprenis renkontiĝon kun famaj moskvaj esperantistoj kaj reperezentantoj de amaskomunikiloj. Noktklubado ankaŭ estas rakontinda: tro malfrua alveno unue ne ebligis nin eniri la plej bonan moskvan klubon, do ni iris al la alia, kie ni amuziĝis malgraŭ ke ĝi estis tute malplena. Frumatene ni revenis al la unua klubo kaj ĉi-foje povis eniri. Tie ni dancis ĝis la malfermo de la metroo. Preskaŭ la tutan lastan tagon mi pasigis en la hotelo, pro eta malsaniĝo. Tamen sabate matene mi estis denove preta por novaj konatiĝoj, impresoj, frenezaĵoj de IJK, al kiu nin, ĉiujn MAK-anojn, veturigis 2 aŭtobusoj.

Eric Languillat, intervjuita de Alla Kudrjaŝova

POSTKONGRESO EN ĈEBOKSARI

De la 18-a ĝis la 22-a de julio en la urbo Ĉeboksari pasis IJK-postkongreso. Tiu ĉi postkongreso estis unu el la lastaj paŝoj de IJK kaj ebligis al partoprenantoj konatiĝi kun la ĉuvaŝa kulturo kaj laboro de ĉeboksaraj Esperanto-organizoj.

En la postkongreso partoprenis 90 personoj, el kiuj 10 estis el 6 urboj de Rusio (Krasnojarsk, N.Novgorod, Sankt-Peterburg, Ŝumerlja, Tula, Uljanovsk), 27 – el 15 aliaj landoj (Aŭstrio, Bosnio-Hercegovino, Danio, Germanio, Francio, Hispanio, Italio, Kanado, Kazaĥio, Nederlando, Pollando, Svedio, Taĝikio, Ukrainio,

Usono), la ceteraj estis ĉeboksaranoj.

La programo de la postkongreso estis dividita en du partojn: ekskursan kaj aktivigan. Post semajna IJK la organizantoj decidis organizi programerojn en diversaj partoj de la urbo: okazis ekskursa promenado, ronda tablo pri la ĉuvaŝa lingvo, ĉuvaŝa folklora vespero, infana interkultura koncerto, ŝipekskurso, ripoza tago en alia bordo de Volgo kun rusaj manĝaĵoj kaj banejo, komuna vespermanĝo en restoracio. La ekskursan programon fermis mardo kun vizitoj al la konfita fabriko "Akkond", metiejo de ĉuvaŝa pentristo Praski Vitti kaj programo de "Rusa balo". Enkadre de "Rusa balo" estis preparita la teatraĵeto "Mevo Ĝonatan Livingston" laŭ la libro de R.Baĥ (R.Bach). Instruisto de urba muzika lernejo Jelena Oreĥova prezentis rusan romancon. Finis la programon eta rusa balo kun mazurko, kvadrilo kaj kelkaj karnavalaj dancoj de IJK.

La 21-an de julio komenciĝis aktiviga parto de PK. Okazis gazetara konferenco ĉe Ŝtata departamento pri junularaj aferoj. Dum la konferenco Ĵenja Zvereva kaj Joel Amis rakontis pri E-revuoj kaj TEJO, Mihau Vizogorodski – pri la sekva IJK, Lluis Battle i Rossell kaj Jan Schroeder – pri propraj urboj kaj impresoj pri Ĉeboksari. La informoj pri PK poste aperis en du ŝtataj televidkanaloj, unu radio kaj du gazetoj. Aparte estis organizitaj intervjuoj ĉe la ŝtata radio, dum kiuj Normand Fleury (Kanado), Janusz Myzik (Pollando) kaj Gregor Hinker (Aŭstrio) rakontis pri Esperanto kaj eventoj de ĉi somero.



Dum du lastaj tagoj estis organizitaj du vizitoj al infanaj someraj tendaroj. En la lingva tendaro "Sodruĵestvo" infanoj aŭskultis pri Esperanto en tri lingvaj rondoj: la rusa, la angla kaj la franca. En la bazejo "Ĉajka" okazis malgranda festivalo de lingvoj kaj kulturoj. Ni prezentis Norvegion, Germanion, Kanadon, Pollandon kaj Esperanton. Fine de la programo infanoj konkuris en ĝusta prononcado de langrompiloj kaj provis trovi ĝustajn respondojn al demandoj pri prezentitaj landoj. Kiel unua premio estis prezentita lernolibro de Esperanto. Post la programo en la tendaroj okazis prezento de la aktivaĵoj de la Junulara Esperanto-Asocio de Ĉuvaŝa Respubliko kaj de la Ĉeboksara Esperanto-Centro. Poste ni parolis pri eventuala kunlaboro inter JEAĈR, ĈEC kaj aliurbaj, alilandaj organizoj. Kiel bonan formon de kunlaboro ni pridiskutis laborbrigadojn.

Aleksandra Fedotova, oficisto de ĈEC

Nun ni volas prezenti al vi gravajn informojn, kiuj koncernas ĉiun REJM-anon.

REJM-KONFERENCO

En la antaŭlasta tago de IJK pasis konferenco de REJM, dum kiu estis akceptitaj gravaj decidoj kiuj koncernas estonton de nia organizo.

Plej gravaj ŝanĝoj okazos en strukturo kaj principoj de formado de la komitato: sekva komitato formiĝos el reprezentantoj de kluboj, kaj kluboj pro tio devas nepre plenumi sekvajn principojn:

– *minimume 5 membroj de la klubo devas esti membroj de REJM;*

– *minimume unufoje jare okazigi Esperanto-kurson;*

– *kunveno de la membroj devas esti minimume unufoje monate.*

Do, ĝis la 25-a de septembro kluboj devas prezenti siajn kandidatojn, kaj ekde la 1-a de oktobro ekfunkcios la nova komitato.

Oni ankaŭ parolis pri la sekvajaraj EoLA kaj OkSEJT, estis decidite ke ĉi-jare REJM delegas sian rajton kundecidi pri la loko de EoLA en 2005 al REU-Estraro. Kaj por OkSEJT en 2005 nun estas 2 urboj-kandidatoj – Ĉeboksari kaj Jelec, kiuj septembre devas prezenti pli precizajn proponojn pri la aranĝo; pri la loko por OkSEJT decidos jam la nova komitato.

Post IJK al REJM aliĝis multe da personoj, kaj pro tio ni ripetas informojn.

KION GRAVAS FARI, SE VI ALIĜIS AL REJM

Ĉi-jare multaj novaj homoj venis al REJM, tio ege ĝojigas nin, la "malnovan popolon". Jen estas kelkaj konsiletoj por la nov-aliĝintoj.

Se vi ne havas aliron al Interreto, pensu kiel ekhavi ĝin. Nenio ligas esperantistojn en la moderna mondo pli facile kaj rapide, ol Interreto. Rusiaj esperantistoj kutime uzas nur retpoŝton por tio – kaj retpoŝto ne postulas grandajn elspezojn. Eĉ por plej aktivaj REJM-anoj sufiĉas legi retpoŝton 1-2-foje semajne.

Aliĝu al la retpoŝta grupo <nur-rejm>. Pere de tiu retpoŝta grupo vi ricevos plej freŝajn novaĵojn de nia junulara movado kaj ankaŭ povos diskuti pri diversaj aktualaj aferoj. Por aliĝi necesas sendi malplenan leteron al la adreso <nur-rejm-subscribe@yahoogroups.com> kaj respondi (nur premi butonon "Respondu" kaj forsendi) la poste venontan anglalingvan peton konfirmi la aliĝon. En <nur-rejm> rajtas ĉeesti nur membroj kaj patronoj (subtenantoj) de REJM. Uzu do vian rajton!

Aliĝu al la informkanalo <e-rus-informoj>. Absolute simile al <nur-rejm> vi povas aliĝi al la novaĵ-grupo <e-rus-informoj> – sendu leteron al la iom longa adreso <esperanto-rus-informoj-subscribe@yahoogroups.com>. Atentu, ke en tiu grupo oni ne diskutas – nur ricevas novaĵojn pri Esperanto-vivo en Rusio kaj apude. Certe, ankaŭ vi rajtas sendi novaĵojn pri Esperanto en via urbo aŭ regiono.

Legu REGon. Kiel membro de REJM vi havas eblon legi la *Rusian Esperanto-Gazeton* (REGo). Eĉ se via Esperanto ankoraŭ ne estas bona, provu legi REGon. Mi konas minimume du personojn, kiuj uzas REGon por daŭrigi sian lingvan perfektigon post baza kurso de Esperanto. Vi samtempe plibonigos vian

Esperanton kaj iĝos bone informita pri ĉio, kio okazas en Esperanto-mondo.

Interesiĝu aktive. Ne estas bona sinteno atendi, kiam oni venos al vi kaj proponos partopreni en iu interesa Esperanto-projekto. Serĉu mem. Demandadu aliajn homojn en REJM, pri kio ili okupiĝas kadre de la junulara movado. Amikiĝu kun REJM-anoj kaj interkomuniku. Nur se ĉiu REJM-ano interesiĝos pri REJM-aj aferoj *aktive*, ni sukcesos atingi bonajn rezultojn kune.

amike, Slavik Ivanov, REJM-komitatano

REJM-MEMBROJ POR 2004

Aleksandrov Igorj, Aleksandrov Konstantin, Alopina Jelena, Ambarnikova Natalja, Andrejsons Sergej, Bajda Natalja, Bakurova Marija, Beljavcev Pavel, Belkova Julija, Belovolov Anton, Berger Jevgenija, Burkina Oksana, Burkulakova Natalja, Ĉerniŝova Oljga, Ĉugunkina Oljga, Deljcov Jevgenij, Dmitrieva Larisa, Dronova Viktorija, Fedotova Aleksandra, Galimzjanova Regina, Gonĉarova Svetlana, Graĵdanova Oksana, Grigorjeva Oljga, Grigorjeva Tatjana, Grigorjevskaja Oljga, Gurjeva Larisa, Hekland Bård, Ĥaritonova Ljubovj, Ĥaritonova Nadeĵda, Ĥlizov Konstantin, Ĥmelj Gennadij, Ignatjeva Jekaterina, Iljuŝin Miĥail, Ivaniŝĉenko Darja, Ivaniŝĉenko Vsevolod, Ivannikova Oljga, Ivanov Vjaĉeslav, Jakimov Sergej, Jakovleva Irina, Jedemskaja Oljga, Jeldanova Anna, Ĵirnova Jekaterina, Ĵukolina Marija, Kadar Aleks, Klementjev Sergej, Koĵevnikova Ksenija, Kolosov Eduard, Kolosova Lana, Koltunov Valerij, Konstantinov Anton, Kostina Jelena, Koval Jelena, Kozlov Aleksej, Kozuljaeva Anastasija, Kudrjaŝova Alla, Lisina Anna, Ljubuŝina Jekaterina, Loskutova Maja, Maciboruk Anna, Malasajev Konstantin, Malenko Vitalij, Masljonkina Natalja, Maslova Jelena, Melnikova Jelena, Mirgorodskaja Oksana, Mironova Tatjana, Muljukova Antonina, Nekrasov Maksim, Nosova Jekaterina, Obrazcov Konstantin, Orlova Anna, Pavlova Jekaterina, Penjkov Andrej, Penjkova Julija, Popova Oljga, Prilepskaja Ksenija, Rogaĉjova Anna, Sadikov Marat, Safonov Igorj, Sakajeva Diana, Salajeva Aleksandra, Salajeva Natalja, Saljkova Galina, Semjonova Irina, Serdjuk Aleksej, Sergejeva Oljga, Sidorova Valentina, Smikov Ilja, Solonenko Denis, Solovjova Oljga, Staricina Jelena, Stepanov Maksim, Sudakova Aleksandra, Ŝevĉenko Anna, Ŝevĉenko Jevgenij, Ŝevĉenko Oljga, Ŝmarova Uljana, Talamanov Oleg, Terjoĥina Marija, Tiĥonov Jevgenij, Tiĥonov Sergej, Tolstova Tatjana, Truĥin Aleksandr, Tureckij Sergej, Vasilejko Polina, Vasiljev Igorj, Vasiljeva Alina, Viĥrov Konstantin, Vinokurova Valentina, Voroncova Katerina, Voroncova Oksana, Voronin Aleksandr, Voronov Vasilij, Zotova Jelena

Patronoj: *Arbekova Katerina, Batirova Guvarŝa, Beĉedov Abdula, Beĉedova Hadijat, Belov Aleksandr, Bozin Sergej, Bruĥis Pavel, Burdov Dmitrij, Daŝkova Tatjana, Gonĉarova Irina, Gordienko Oljga, Karcev Jurij, Kokolija Georgij, Lopatin Pavel, Magomedhabibulaeva Luiza, Mironova Irina, Poliŝĉuk Valentina, Povorin Miĥail, Ŝevĉuk Viktorija.*

Eksciu, ke...

TVC PRI ESPERANTO

La 5-an de aŭgusto, proksimume je 19.15 tria televidkanalo TVC montris elsendon pri Esperanto. Ĝi daŭris 7-8 minutojn. Pri diversaj aspektoj de la lingvo, ĝia instruado, historio kaj movado parolis Vladimir Samodaj, Anatolo Gonĉarov, Gennadij Ŝilo kaj Svetlana Gonĉarova. Sonis ankaŭ interparolo kaj versaĵo en Esperanto. La intervjuoj estis filmitaj en Eŭropa Jura Universitato JUSTO kaj en la hejmo de Irina kaj Svetlana Gonĉarova, videblis multaj E-libroj kaj fotoj de diversaj renkontiĝoj. Ilustre estis iomete montrita ankaŭ balanciĝado kaj kantado de spektantaj vicoj dum koncerto en iu amasa aranĝo (laŭ mia supozo – EoLA en Ivanovo en 1998), tie mi rekonis multajn konatojn. Ĝenerale la elsendo estis pozitiva kun multaj interesaj informoj pri Esperanto.

Garik Kokolija (Moskvo)

La 25-an de junio en la E-familio de Jelena kaj Andrej Obrezkov naskiĝis filo (jam la tria!) Andrej. Gratulojn!

PlesIMEA-2004 PASIS

La 11-14-an de junio en pitoreska ĉevolga urbeto Pljos pasis tradicia (jam la kvara) renkontiĝo PlesIMEA-2004. La renkontiĝon, dediĉitan al medicino, sano kaj sana vivmaniero, organizis Ivanova Medicina Esperanta Asocio (la ĉeforganizinto – ĝia prezidanto d-ro Pavel Volkov). PlesIMEA celas esperantistojn kaj ankaŭ medicinistojn interisiĝantajn pri Esperanto, tial la labora lingvo estis la rusa. Dum la aranĝo okazis prelegoj de Mirina (Irina Gonĉarova) pri Esperanto kaj E-movado, ankaŭ estis multe da temaj programeroj: psikologiaj trejnadoj fare de Etulino (Jelena Akimova) kaj Dina Kvasova, jogo-trejnadoj fare de Etulino, Sonjo Ŝejnina kaj Artjom Kozel, teaj ceremonioj kaj meditadoj. Inter aliaj programeroj speciale menciindas urba ludo, ekskurso al la bela urbo kaj amasa vizito al banejo. La renkontiĝon partoprenis pli ol 60 homoj el 8 regionoj de Rusio: ĉefe el Ivanovo, Niĵnij Novgorod, Moskvo kaj Moskva regiono. Sekva, la 5-a (jubilea!) PlesIMEA okazos en la sama urbeto en junio 2005.

(esperanto-rus-informoj)

LA BICIKLADO BREST-VLADIVOSTOK SUKCESIS!

La 6-an de julio je 16.38 laŭ la Vladivostoka tempo (05.38 GMT) la transkontinenta perbicikla vojaĝo Brest-Vladivostok sukcese finiĝis!

Kiel jam multaj esperantistoj scias, la 1-an de majo 2004 la eminenta franca biciklisto kaj esperantisto Zeferin Ĵegar, alinome Zef, ekiris de Brest (Francio) por atingi Vladivostokon en laŭeble plej malmulte da tempo, parte laŭ la spuroj de Michel Strogoff. La longo de la vojo estis 14200 km. Ĉiutage li biciklis proksimume po 200-260 km. De la urbo Velikije Luki (okcidenta Rusio) ĝis Vladivostoko lin akompanis rusia biciklisto Sergej Baranov el la urbo Niĵnij Tagil (Uralo).



Apud la enirejo de Vladivostoko nian samideanon renkontis la estraro de la Regiona filio de Tutrusia organizaĵo “Sporta Rusio”, vladivostokaj esperantistoj kaj multaj tutrusiaj (NTV, REN-TV, Radio Rossii) kaj regionaj amaskomunikiloj, kiuj informis pri la alveno de nia eminentulo. Dum la restado-ripozo en Vladivostoko okazis diversaj aranĝoj, kiujn partoprenis samideano Zeferin Ĵegar: gazetara konferenco, renkontiĝo kun samideanoj de la Esperanto-klubo “Pacifiko” ktp. En la specialan libron por la Honoraj vizitantoj de la Societo pri Esploro de Amura Regiono li skribis salutvortojn en Esperanto. La 8-an de julio okazis rekta disaŭdigo (dum 30 minutoj) de la renkontiĝo kun Zeferin Ĵegar en la regiona radiostacio “Vladivostok”. Dum ĉiuj oficialaj kaj neoficiaj rendevuoj estis uzata nur nia kara lingvo Esperanto.

La 9-an de julio matene Zeferin Ĵegar jam per la aŭto, kiu sekvis lin de Bresto ĝis Vladivostoko, ekveturis hejmen. Li kaj liaj akompanantaj fartas bone.

Ni esperu, ke nia amiko eniros la Guinness-Libron de la Rekordoj...

Aleksanr Titajev (Vladivostoko),
prezidanto de Esperanto-klubo “Pacifiko”

“JUNA AMIKO” KAJ “LERNU” KUNLABORE

La gazeto por komencantoj kaj lernejanoj “Juna amiko” anoncas novan multlingvan hejmpaĝon, kiu entenas artikoletojn el la revuo. La paĝaro gastas ĉe la hejmpaĝo de “Lernu”, komuna projekto de TEJO kaj ILEI, kiu estas nur unu el pluraj pruvoj pri fortigata kunlaboro inter la junulara kaj instruista organizoj. Kelkaj el la prezentitaj tekstoj, kiel serio pri bestoj, aperis en “Juna amiko” lastatempe, dum aliaj aperis antaŭ dudek jaroj – ili tamen restas valoraj kaj ĝueblaj. Aliaj eroj en la nova paĝaro ne aperis en la presita revuo. La artikoloj aperas nur en Esperanto, sed per deko da dulingvaj elektronikaj vortaroj legantoj povas akiri analizon kaj tradukojn de nekonataj vortoj. Klarigoj pri “Juna amiko” aperas en deko da lingvoj. La hejmpaĝaro “Lernu” enhavas plurajn kursojn, lernilojn, ekzercojn kaj babilejon por vizitantoj. Por vidi la paĝaron de “Juna amiko”, iru al <www.lernu.net> kaj vizitu la bibliotekon per la maldekstra indekso. La paĝaro de “Juna amiko” estas plukonstruata. Pri la revuo mem: la dua el la kvar numeroj por 2004 estas ekspedita, abonoj atingis 98% de la pasintjaraj sumoj; malfruaj abonoj por 2004 estas plenumeblaj kaj bonvenaj.

Stefan MacGill (Hungario)

REZULTOJ DE BELARTAJ KONKURSOJ DE UEA

Poezio

1-a premio: ***Mikaelo Giŝpling*** (Israelo) pro "Transe"
2-a premio: ***Mikaelo Giŝpling*** (Israelo) pro "El ciklo Hamleto"
3-a premio: ***Paulo Sergio Viana*** (Brazilo) pro "Orienta rakonto"
Honora mencio: ***Mikaelo Giŝpling*** (Israelo) pro "Lumturo"
Partoprenis 33 konkursaĵoj de 16 aŭtoroj el 11 landoj

Prozo

1-a premio: ***Ulrich Becker*** (Usono) pro "La inico"
2-a premio: ***Ulrich Becker*** (Usono) pro "La virino kun la helbluaj okuloj"
3-a premio: ***Lenke Szasz*** (Rumanio) pro "La suno kaj la flava floreto"
Honoraj mencioj: ***Lena Karpunina*** (Germanio) pro "Paradizo de sultanoj" kaj ***Christian Riviere*** (Francio) pro "La bezonata vasto" kaj "La satana strato"
Partoprenis 24 konkursaĵoj de 14 aŭtoroj el 8 landoj

Teatraĵoj

1-a premio: ***Paul Gubbins*** (Britio) pro "Heksakloro unu komo tri"
2-a premio: ***Paul Gubbins*** (Britio) pro "Fina movimento"
3-a premio: ***Paul Gubbins*** (Britio) pro "Pacaj batalantoj"
Partoprenis 4 konkursaĵoj de 2 aŭtoroj el 2 landoj

Eseoj

Neniu premio aljuĝita. *Partoprenis 2 konkursaĵoj de 2 aŭtoroj el 2 landoj.*

Kantoj

3-a premio: ***Sonia Sanchez*** (Brazilo) pro "La danco de la papilio"
Partoprenis 3 konkursaĵoj de 1 aŭtoro.

Infanlibroj

Premio "Infanlibro de la Jaro 2003": Flandra Esperanto-Ligo pro ***"La aventuroj de Pinokjo"*** de Carlo Collodi, tradukita de Jozefo Horvath.
Partoprenis 6 libroj de 4 eldonejoj el 4 landoj.



anonco de la rezultoj dum UK en Pekino

Vidbendoj

Neniu premio aljuĝita. *Partoprenis 1 konkursaĵo.*

Premio "Nova talento": ***Keyhan Sayadpour*** (Irano) pro la poemo "Venis la printempo"

ESPERANTISTO-PIANISTO DENOVE GAJNIS

Andrej Korobejnikov el Moskvo estas konata al multaj esperantistoj kiel brila juna pianisto, prezentinta sian talenton dum la UK-oj en Zagrebo kaj Gotenburgo. Esperanton li studis en Eŭropa Jura Universitato JUSTO en Moskvo, kie nia lingvo estas parto de la deviga programo. Fine de junio 2004 li venkis en prestiĝa internacia konkurso de pianistoj je la nomo de Aleksandr Skrjabin, en Moskvo. Kune kun la ĉefa premio li ricevis ankaŭ kontraktojn por rusia kaj internacia turneoj kaj la rajton malfermi ĉi-jaran muzikan sezonon en Parizo.

(NUN)

LA LERNOLIBRO REKOMENDITA

de Rusia ministerio pri edukado

Nova reeldono de la lernolibro de Esperanto "Эсперанто для международного общения" ("Esperanto por internacia komunikiĝo"; aŭtoro – Irina Gonĉarova) aperis en Moskvo dank' al Internacia Instituto "INFO-Rutenia". La lernolibro estas destinita por studentoj de nelingvistikaj universitatoj kaj rekomendita de Rusia Ministerio pri edukado. La lernolibro enhavas 13 lecionojn, gramatikan suplementon, Esperanto-rusan kaj rus-Esperantan vortarojn, ĝi taŭgas kaj por ĉeestaj kursoj, kaj por koresponda instruado. Akiri la lernolibron eblas en la Libroservo ĉe Moskva Esperanto-Centro <http://www.comail.ru/~esperanto/> kontraŭ 130 rubloj.

(esperanto-rus-informoj)

NOVAJ KOMPAKTDISKOJ

Speciale al IJK-60 estis finpretigitaj (kaj tre sukcese tie vendiĝis) du novaj kompakdiskoj.

"Vivaj Koncertoj". La disko enhavas koncertojn de la plej konataj E-kantistoj, registritaj ĉefe dum rusiaj E-aranĝoj inter 1997 kaj 2002. La registraĵoj estas en la formato MP3 kun entuta daŭro preskaŭ 11 horoj. La disko havas grafikan navigan sistemon kun la fotoj de la artistoj kaj mallongaj prezentoj pri ili. Kolora kovrilo. Enhavo: ***Slava Bondarjkov*** – 5 kantoj, 16 min. (RET, 2002); ***Sergej Bozin*** – 16 kantoj, 53 min. (RET, 2002); ***Mikaelo Bronŝtejn*** – 9 kantoj, poemoj, 56 min. (RET, 2002); ***"Ekvinokso"*** – 11 kantoj, 29 min. (Ivanovo, 1997-98); ***Jean-Marc Leclercq (JoMo)*** – 11 kantoj, 33 min. (EoLA, 1998); ***Ĵomart kaj Nataŝa*** – 19 kantoj, 82 min. (RET, 2002); ***Maŝa Koĉetkova*** – 18 kantoj, 62 min. (RET, 2002); ***Paŝa Korotenko kaj Griŝa Arosev*** – 23 kantoj, 87min. (RET, 2002); ***Aleksandr Koval kaj Oĉjo Dadaev*** – 7 kantoj, 13 min. (RET, 2002); ***Ivan Naumov kaj kompanio*** – 4 kantoj, 15 min. (OkSEJT, 1999); ***Andrej Obrezkov*** – 4 kantoj, 13 min. (Stokholmo, 1999); ***Miĥail Povorin*** – 4 kantoj, 16 min. (KD, 2002); ***Anatolij Radaev*** – 5 kantoj, 14 min. (RET, 2002); ***"Slavjanskaj Stomakoj"*** – 16 kantoj, 48 min. (EoLA, 1998); ***Evelina Sokolova*** – 2 kantoj, 5 min. (EoLA, 1998); ***Vladimir Soroka kaj kompanio*** – 127 min. (2 koncertoj, RET, 2002); ***Vladimir Ŝiŝkin*** – 12 kantoj, 37 min. (EoLA, 1998). La disko kostas 100 rub.

Esperanto KD 2004. ***Tekstoj*** – 55 popularaj verkoj en la formatoj HTML kaj PDF, Plena Manlibro de Esperanto-Gramatiko, jarkolekto de la revuo Esperanto

por 2003 (HTML), progresigaj lernolibroj de B.Kolker, H.Seppik, C.Piron. ***Kantoj*** – Preskaŭ 90 kantoj de koncertoj de Sergej Bozin, Maŝa Koĉetkova, Pavel Korotenko kaj Grigorij Arosev kaj krome specimenaj kanzonoj de konataj alilandaj E-kantistoj. Entute 208 min. ***Vortaroj*** – 10 vortaroj, i.a. ReVo (reta alternativo de PIV!), du versioj de la Bokarev-vortaro, ampleksega angla-Esperanto-vortaro, Hejma Vortaro, Kemia Vortaro, ks. ***Sonarkivoj*** – maloftegaj registraĵoj el la Biblioteko Hector Hodler de UEA. Voĉoj kaj kongresaj salutoj de diversnaciaj esperantistoj, parolado de Ivo Lapenna, deklamoj de William Auld, Kalomano Kalocsay, Nikolaj Rytjkov. Entute 138 min. ***Vikipedio*** – E-a versio de la fama reta enciklopedio. 10137 artikoloj! ***Filmoj*** – malgrandaj filmetoj, faritaj dum IJK-59 kaj EoLA-14, subtitoloj por kelkaj filmoj. ***Programoj*** – japana parolsinteza programo ESPTAPI – por instrui vian komputilon paroli en Esperanto, Ek!, UniRed kaj pluraj aliaj utilaj programoj. Pli ol 60 ludoj de Mikaelo Povorin, kelkaj pliaj ludoj. ***Lerniloj*** – 10 ruslingvaj E-lerniloj, i.a. la Unua Libro de Zamenhof (gif-formata). La disko havas grafikan navigan sistemon (HTML), koloran kovrilon. La disko kostas 110 rub.

Ambaŭ diskoj mendeblas ĉe Andrej Grigorjevskij <andreo@esperanto.msx.ru>.

(E-rus-informoj)

LIRO-2004

La redakcio de "La Ondo de Esperanto" denove invitas ĉiujn dezirantojn partopreni en la tradicia literatura konkurso "Liro".

Liro-2004 havas kvin branĉojn:

1. Originala prozo.
2. Originala poezio.
3. Traduka poezio el la rusa lingvo: "Neznakomka" de Aleksandr Blok.
4. Traduka prozo el la rusa lingvo: "Birjuk" de Ivan Turgenev.
5. Traduka prozo el la angla lingvo: "The Devil in the Belfry" de Edgar Allan Poe.

En ĉiu originala branĉo oni rajtas partopreni per ne pli ol tri verkoj.

Sendu kvar tajpitajn, komputile kompostitajn aŭ klare skribitajn ekzemplerojn de la konkursaĵo al la sekretario de "Liro" Halina Gorecka (RU-236039 Kaliningrad, p/k. 1248). La konkursaĵoj devos atingi la organizantojn antaŭ la 15-a de oktobro 2004. Subskribu vian konkursaĵon per pseŭdonimo kaj aldonu slipon kun indiko de la pseŭdonimo, aŭtenta nomo kaj poŝta adreso. Oni ne rajtas sendi verkojn, kiuj estis publikigitaj aŭ premiitaj en aliaj konkursoj.

La originalajn tekstojn de la tradukendaj verkoj petu ĉe la sekretario kontraŭ afrankita koverto (por Ruslando) aŭ internacia respondkupono. La elektronikaj tekstoj estas elŝuteblaj ĉe <http://Esperanto.Org/Ondo/Ind-liro.htm>.

La laŭreatoj ricevos diplomojn kaj libropremiojn. La rezulto estos anoncita je la Zamenhofa Tago 2004. La organizantoj ĝis la 1-a de januaro 2007 havos la rajton de la unua publikigo de la ricevitaj konkursaĵoj en "La Ondo de Esperanto", libroforme kaj elektronike. La kopirajto restas ĉe la aŭtoro, kiu konsentas cedi ĝin senpage en okazo de eldono de antologio de "Liro". Sukcesojn!

(reu-agado)

LA MONOGRAFIO DE A.MELNIKOV

А.С.Мельников. Лингвокультурологические аспекты плановых международных языков (на фоне этнических) / Научный редактор проф. А.Д.Дуличенко. – Ростов-на-Дону – Издательство Ростовского государственного педагогического университета, 2004; 632 с.

Ruslingva monografio de fama rusia esperantisto, lingvisto, sciencisto kaj E-instruisto Aleksandro Melnikov "Lingvokulturaj aspektoj de planaj internaciaj lingvoj (sur fono de etnaj lingvoj)" estas dediĉita al kapabloj de planaj lingvoj, kaj unuavice de Esperanto, krei, konservi kaj respeguli kulturajn valoraĵojn en procezo de interkultura komunikado. Intercetere en la monografio estas priskribita naskiĝo de nova, "kvazaŭ-etna", tipo de kulturo – kulturo de tiel nomataj tipaj esperantistoj, estas determinita la sfero de specifaj fonaj scioj de Esperanto-movadanaro kaj klarigitaj la lingvaj mekanismoj por fiksado de nova tipo de kulturo.

Eblas mendi la libron ĉe Libroservo de Moskva Esperanto-Centro <esperanto@e-mail.ru>. Atendata prezo – 300 rubloj. Ĉe sama libroservo eblas kontraŭ 50 rubloj akiri alian ruslingvan libron de Aleksandro Melnikov – "Portreto de la ideo kun stranguloj anstataŭ fono, aŭ la lingvo de Doktoro Esperanto".

(esperanto-rus-informoj)

THORSEN-APOGO POR BIBLIOTEKOJ

UEA disdonos jam por la oka fojo subvenciojn al Esperanto-bibliotekoj el la ***Biblioteka Apogo Roma kaj Poul Thorsen.*** Rajtas peti subvencion Esperanto-bibliotekoj, kiuj ne estas subtenataj de ŝtata, urba aŭ alia publika instanco. La subvencipetojn devas akompani listo de dezirataj libroj, ordigita laŭ prefero. Diskoj, sonkasedoj, vidbendoj, k.a. ne-libraj varoj ne estas subvencieblaj. La subvencion oni ricevos kiel librojn surbaze de la listo, kiu akompanis la peton. La petoj devas atingi la Centran Oficejon de UEA plej laste la 1-an de novembro 2004.

(Gazetaraj Komunikoj de UEA № 182)

LA 7-A INTERNACIA FOTOKONKURSO

Post ses sukcesaj konkursoj (1998, 1999, 2000, 2001, 2002, 2003) la redakcio de "La Ondo de Esperanto" invitas al partopreno en la sepa Internacia Fotokonkurso.

La konkurso ne estas ligita al deviga temo. En la konkurso rajtas partopreni ĉiu fotemulo amatora aŭ profesia, sendepende de la loĝlando kaj lingvokono. Unu persono rajtas partopreni per maksimume kvin fotoj. La minimuma formato estas 10×15cm. Fotoj povas esti koloraj aŭ nigra-blankaj, vertikalaj, horizontalaj kaj aliformataj. Fotoj senditaj elektronike ne estas akceptataj.

La konkursaj fotoj devas esti senditaj unuekzemplere al la sekretario de la konkurso, Halina Gorecka (RU-236039 Kaliningrad, p/k 1248). La fotoj devas atingi la sekretarion de la konkurso antaŭ la 1-a de decembro 2004.

La konkursaĵoj devas esti subskribitaj per pseŭdonimo. En aparta koverto kunsendata devas esti slipo kun la pseŭdonimo, aŭtenta nomo kaj poŝta adreso de la aŭtoro. Oni povas aldoni titolon aŭ klarigan noton al la fotoj, sed tio ne estas

deviga. En la konkurso ne rajtas partopreni fotoj, kiuj jam estis premiitaj aŭ publikigitaj.

La juĝkomisiono aljuĝos premiojn al la laŭreatoj:

1. 50 eŭroj kaj abono de "La Ondo de Esperanto" por 2005.

2. 25 eŭroj kaj abono de "La Ondo de Esperanto" por 2005.

3. Abono de "La Ondo de Esperanto" por 2005.

Specialan premion (libroj de Sezonoj kontraŭ ekvivalento de 50 eŭroj) ricevos la plej bona foto teme ligita kun Esperanto.

Ĉiu premiito ricevos diplomon. La rezulto estos anoncita je la Zamenhofa Tago 2004. La organizantoj rezervas al si la rajton ĝis la 31-a de decembro 2006 uzi la ricevitajn fotojn en papera kaj elektronika formoj kaj en ekspozicioj. Sukcesojn!

(reu-agado)

BORSA TERMINARO KVINLINGVA

Aperis "Borsa Terminaro kvinlingva" (Germana – Angla – Esperanta – Franca – Nederlanda) de Hans Wiersch, 137 paĝoj A4 (prezo 9 eŭroj + afranko ĉe <http://retbutiko.esperanto.be>). Pri la libro komentis Franz Josef Braun: "Per sia Borsa Terminaro Hans Wiersch fermas truegon en la Esperantaj terminaroj pri ekonomio kaj komerco". Kaj Hans Wiersch mem: "La Borsa Terminaro volas helpi ne nur al nespecialistoj, sed same al fakuloj por internacie trovi grandan nombron da terminoj". ***(NUN)***

MODERNIGITA VORTARO

E.A.Bokarjov. Esperanta-rusa vortaro. *Ĉirkaŭ 29 000 vortoj. Reviziita kaj kompletigita de Jurij Finkel kaj Igor Galiĉskij. Loko de eldono ne indikita. 2002. 308 p.*

Ĉe la sojlo de la renaskiĝo de Esperanto-movado en la post-Stalina Sovet-Unio staris profesoro Jevgenij Aleksejeviĉ Bokarjov (tiu transskribo de lia familinomo pli ĝuste reflektas ĝian prononcon ol la transliterigo Bokarev). Ĝuste en tiu ĉi jaro 2004 ni celebras la centjaran jubileon de post lia naskiĝo, pri kio aperis artikolo de Viktor Aroloviĉ en REGo, № 1, 2004.

En la epoko, kiam tio ŝajnis tute nekredebla, li sukcesis, kun grupo de kunlaborantoj, kompili rusan-Esperantan vortaron kaj publikigi ĝin en la jaro 1966 ĉe grava ŝtata eldonejo. Paralele kaj dum postaj jaroj li sola plu laboris pri Esperanta-rusa vortaro. Kiel ĉefaj fontoj servis Plena vortaro, Granda vortaro Esperanta-franca de Gaston Waringhien kaj aliaj gravaj tiutempaj vortaroj kaj pluraj vortaroj eldonitaj en Rusio. Tre grandan atenton E.A.Bokarjov donis al la Zamenhofa tradicio, inkluzive ties rimarkojn pri la vortaro de Korzlinskij. PIV aperis, kiam la laboro pri la Esperanta-rusa vortaro estis pli-malpli finita, do ĝi preskaŭ ne influis ĉi-kaze.

En septembro 1969 mi estis lastfoje en la hejmo de E.A.Bokarjov. Tiam li montris al mi la sliparon de la ankoraŭ ne finita Esperanta-rusa vortaro, kaj ni parolis pri tiu vortaro kaj pri vortaraj temoj. Li diris al mi: "Mi nenion fidas blinde, mi ĉion zorge kontrolas. Rezulte, mi trovis amason da fuŝaĵoj ne nur en Esperantaj vortaroj, sed ankaŭ, ekzemple, en la franca-rusa vortaro de Ganŝina. Mankas tempo por verki artikolon pri tio. Sed mi penas fari la vortaron perfekta. Se iam mi havos

la trian infarkton kaj mortos, tio okazos pro la intensa laboro pri la Esperanta-rusa vortaro". Kiel ekzemplojn, li citis plurajn nomojn de plantoj, fiŝoj kaj mineraloj mistradukitaj. Mi honte konstatis, ke tiuj vortoj estis por mi nekonataj.

Lia antaŭdiro, bedaŭrinde, realiĝis tre baldaŭ: post jaro kaj duono li forpasis pro infarkto. La laboro pri la vortaro restis nefinita. Ĝi aperis nur en 1974 sub redakto de profesoro Viktoro Grigorjev kaj estis dufoje represita senŝanĝe.

Dum nia lasta konversacio E.A.Bokarjov emfazis, ke li konsekvence atentis pri la ĉefa diferenco inter la Esperanta-nacia kaj nacia-Esperanta vortaroj. La unua enhavu maksimumon da Esperantaj radikaj vortoj; la dua – nur rekomendatajn, ofte uzatajn. La du vortaroj de Bokarjov nete sekvas tiun principon. Kiam aperis PIV, ĝi fariĝis etalono; tial la post-PIV-aj vortaroj diverslandaj similas unu la alian. La antaŭ-PIV-aj vortaroj estas pli buntaj. La merito de Esperanta-rusa vortaro de Bokarjov estas ankaŭ en tio, ke ĝi donas vortojn, kiuj ne trafis eĉ PIV-on.

Kun paso de jaroj, ruslingvaj esperantistoj sentis bezonon de pli moderna vortaro. Ĉar tia ne videblas ĉe la horizonto, Jurij Finkel (vaste konata pro sia komputila programo EK!, kiu ebligas tajpi Esperantajn supersignitajn literojn surbaze de la normo Unikodo) kaj Igor Galiĉskij entreprenis modernigon de la Bokarjova vortaro. Kiel konsilantoj kaj helpantoj servis S.Pokrovskij, B.Kolker, S.Verŝinin kaj V.Melnikov.

La nova versio de la vortaro enprenis multajn novajn vortojn kaj pliĝustigis multajn tradukojn. Por tio estis prilaboritaj plej novaj vortaroj kaj la ĉiam pli perfektigata Reta vortaro. La vortoj ricevis indikojn pri fundamenteco aŭ oficialeco. En tradukoj estas pligrandigita kvanto de sinonimoj. Plimultiĝis indikoj pri sferoj de uzado de vortoj. Biologiaj terminoj estas provizitaj per latinaj ekvivalentoj. Granda prilaboro okazis ĉe propraj kaj geografiaj nomoj, kiuj nun troviĝas ne en suplemento sed en la korpuso de la vortaro.

La vortaro estas modeste, sed klare presita (eble negrandkvante). Grave – ĝi estas nemultekosta. Kompreneble, oni povus riproĉi ion al la novaj redaktoroj, ekzemple, ke ili enprenis tro multe da novaj vortoj. Sed, kiel diras proverbo, butero ne difektas la kaĉon. Laŭ mia opinio, la nova versio de la vortaro ne nur ebligas al ruslingvanoj senĝene legi kiujn ajn E-tekstojn, sed ankaŭ povas fariĝi bona fonto por estontaj Esperantaj-naciaj vortaroj.

Boris Kolker (Usono)
"Esperanto", 2004, n-ro 7-8, p. 160

ORATORA KONKURSO DUM LA PEKINA UK

El la naŭ partoprenintoj de la Oratora Konkurso de UEA dum la 89-a UK en Pekino, gajnis la sekvaj gejunuloj: unua premio – s-ro Cassius Genesio DESCONSI, Brazilo, pri la temo "Kial lerni Esperanton?"; dua premio (dividita) – s-ro Christopher CULVER, Usono, pri la temo "Libera senpaga kopiado de muziko: kion fari?", kaj s-ro Andreo KOROBEJNIKOV, Rusio, pri la temo "Kial lerni Esperanton?"; tria premio – f-ino PENG Nian, Ĉinio, pri la temo "Kial lerni Esperanton?". Ĉiuj gajnintoj ricevis valorajn premiojn kaj diplomojn.

(tejo-aktuale)

Ljubovj Isajeva (Muromcevo, Vladimira reg.)

Ĉu vi scias, kio ĝi estis?

Mi eniris la ejon kaj tuj ekvidis Kirillon. Li staris en fora angulo kaj babiladis kun iu.

Mi aliris kaj salutis lin. Li turnis sin al mi kun responda saluto, agrabla kaj tia, kvazaŭ ni vidis antaŭe unu la alian nur hieraŭ.

La rememoroj kaj pensoj okupis min. Kio ja ĝi estas, finfine?! Kia stranga forto igas min pensi pri tiu viro? Kia stranga sento? Ĉu amo? Sed mi jam dum multaj jaroj amas alian homon, la plej karan en mia animo. Sed Kirill? Kiu estas li por mi?

Mi rememoras la unuan renkontiĝon, mi memoras ĝin, kvazaŭ ĝi okazis hieraŭ: liajn bonkorecajn okulojn, lian varman voĉon – "Saluton! Ĉu vi estas Nadeĵda? Mi ĝojas konatiĝi kun vi. Ĉu vi scias, kie kunvenas niaj urbaj samideanoj? Mi kun plezuro akompanos vin."

Kaj jen ni iras kune al trolebusa haltejo, babiladas gaje, emocie. Venas la trolebuso, Kirill eniras kaj etendas sian brakon por helpi min eniri. Tiu gesto kortuŝas min, kaj dum tuta dekkelkminuta veturado mi atente rigardas lin, lian altan, fortan figuron, liajn malhelajn harojn, liajn bluajn okulojn. Ni veturas en silento...

Poste, kiam mi revenis hejmen, aliloken, mi penadis, same kiel poste, kompreni, kia sento ekestis en mia koro? Sed mi ne povis respondi. Pli ĝuste, mi tiam opiniis, ke ĝi estas amo, amo malpermesita, vana, ĉar Kirill havis edzinon. Kaj min anticipe turmentis konsciencriproĉoj. Kiam ja dum sekvaj renkontiĝoj mi rimarkis, ke ankaŭ Kirill, ŝajnas, enamiĝis al mi, mi simple ektimis, pensinte pri tio, kio povas okazi plu. Mi malpermesis al mi mem eĉ pensi pri Kirill, kaj eĉ dum la renkontiĝoj (feliĉe aŭ ne, maloftaj, eĉ raraj), kiam mi estadis apud li kaj sentis al li la nekomprenitan (por mi mem), agrablan inklinon, mi tre penadis ne elmontri ĝin al li.

Sed reveninte hejmen, mi denove turmentis min per demandoj: "Ĉu mi ende agas? Ĉu estas pravigebla tia mia sinteno? Ĉu estas honeste kaŝi tiun mian senton de Kirill?" Ja li estas bonkoreca kaj, ŝajnas, ne tre feliĉa homo. Eble ne, sed krom Esperanto ni havas preskaŭ nenion, kion nin firme ligus. Ja sole tio – Esperanto kaj amo, eĉ se ĝi estas vera amo, – ne sufiĉas.

Tion mi bone komprenis post tiu neforgesebla vespero, kiam...

Ĝi estis, ŝajnis, sufiĉe kutima vespero. Se ne konsideri tion, ke mi provis aranĝi en nia loĝloka biblioteko ekspozicion de esperantaĵoj. La vizitantoj preskaŭ forestis. Mi sidis kaj babiladis kun bibliotekistino kaj ŝia amikino. Eniris Nikoĉjo, sed, kiel mi memoras, ne pro la ekspozicio, sed por interŝanĝi librojn. Mi atentigis lin pri la ekspozicio, kaj li ekinteresiĝis. Li trarigardis ĉion atente kaj poste ion demandis. Nikoĉjon mi konis jam delonge, de la infanaĝo, sed ĝis nun ni estis apenaŭ konataj, kaj li, ordinara, dume mezaĝa homo, ĝis nun ne vekis mian intereson. Sed dum tiu vespero ni multe konversaciis. Kaj krom tio, mi malkovris, ke li tre similas al Kirill. Dum la konversacio mi rigardis al Nikoĉjo tre atente, forgesinte pri ĉio alia, pri aliaj ĉeestantoj en la ejo. Reveninte hejmen, mi kaptis

min je tio, ke mi pensadas nur pri Nikoĉjo plejparte. Tio daŭris ankaŭ poste. Ankaŭ nun ĝi daŭras. Mi ĉiam multe pensadas pri li, ĉar mi amas lin.

Sed Kirill... Ĉu mi por ĉiam forgesis pri li tiam? Ho ne! Kvankam okazis tiel, ke post la somero, kiam mi kaj Kirill vizitis (dise) la saman Esperanto-tendaron, ni dum longa tempo ne vidis unu la alian. Kaj leterojn ni interŝanĝis fojfoje. Sed strange – mi ne povis lin tute forgesi. De tempo al tempo venadis rememoroj pri pasintaj renkontoj kaj denove mi sentis konatan, nekompreneblan varmecon kaj deziron ekvidi Kirillon.

Okazis, ke foje post la lasta nia revido ni preskaŭ hazarde renkontiĝis. Estis decembro, estis "hunda" frosto. Sed malgraŭ tio mi pro iu bezono venis en la urbon, kie loĝis Kirill, kaj ektroviĝis proksime de la strato, kie situis lia domo, la domo, en kiu li loĝis.

Fininte la klopodojn, mi volis jam veturi al la stacidomo, sed sentinte, ke mi frostmortos pli frue, ol mi atingos ĝin, mi decidis viziti la loĝejon de Kirill, por iomete varmigi min. Baldaŭ mi eniris en la domon kaj eksonoris je la pordo. Ĝi malfermiĝis, kaj mi ekvidis Kirillon.

"Saluton!" – mi diris, kaj li respondis: "Saluton" tiel, kvazaŭ ni vidis unu la alian lastfoje nur hieraŭ, kaj kvazaŭ mia apero sur la sojlo de lia loĝejo estas tute kutima afero. Cetere, li estis ĝoja min vidi kaj al mia demando "Ĉu mi povas iomete min varmigi en via hejmo?" li respondis: "Jes, certe! Eniru bonvole!"

Ni trairis en la kuirejon, kaj Kirill diris: "Bone estas, ke vi venis. Mi sentas min kulpa, ĉar ne trovis tempon respondi vian lastan leteron. Vi ja scias, mi ne ŝatas skribi leterojn. Sed nun vi demetis la ŝarĝon de mia animo."

Poste li diris: "Sidiĝu, ni trinkos teon, kaj vi varmiĝos." Mi altabliĝis, Kirill metis sur la tablon ujojn kun sukero, konfitaĵo, teleron kun pecoj de bulko, metis tetasojn kaj plenigis ilin per varmega teo. Ni trinkis teon kaj intertempe babiladis: pri Esperanto, pri komunaj gekonatoj, nature ankaŭ geesperantistoj, pri aliaj niaj malsamaj ŝatokupoj. Poste li rakontis pri io sia, nebule konata aŭ tute nekonata al mi. Sed post du horoj mi komprenis, ke mi ne scias pri kio plu paroli aŭ demandi. Feliĉe, al mi jam delonge estis tempo reveni hejmen, kaj mi, dankinte Kirillon pro ĉiasence varma akcepto, adiaŭis lin, dirante sur la sojlo de la loĝejo, ke ni, certe, iam revidos unu la alian. Kirill responde diris, ke certe tio okazos, poste li "ĝisrevidis" kaj mi foriris. Mi estis ĝoja revidi Kirillon, sed post kelkjara disiĝo nia konversacio elĉerpiĝis tro rapide, kaj se ni renkontiĝus sekvatage, mi ne scius pri kio paroli.

Ankaŭ ian nekompreneblan sopiron en la koro mi sentis. Ne malplenon, ne malreviĝon, sed ŝajnis al mi, ke ion proksiman al tio. Mi opiniis tiam, ke tio estas tute komprenebla – ja mi amas Nikoĉjon kaj li anstataŭis en mia koro Kirillon, ne, eĉ pli multon li signifas por mi.

Tamen mi ne tute forgesis Kirillon. Kaj jen okazis nova renkonto, dum iu E-aranĝo. Ekvidinte Kirillon denove, subite (sed eble ne hazarde), mi komprenis, ke jam forestas en mia animo la nekomprenebla sento al li. Mi povus sufiĉe multe da tempo restadi apud li. Sed... Sed mi jam ne havis deziron pri tio. Mi facilanime forlasis lin, por okupi min pri io, babiladis kun aliaj homoj, preskaŭ tute ne

pensante pri Kirill, pri tio, ke li troviĝas ie proksime. Min tute ne incitis, ke Kirill venis kun la edzino, mi ne sentis eĉ malgrandan malamikecon al ŝi. Sed, surprize, mi dum iu momento eksentis ian malagrablecon rilate al Kirill. Tio okazis dum dancvespero, dum kiu mi ĉeestis kiel spektantino, ĉar, bedaŭrinde, ne scipovas danci. Sed tute ne pro mia sento al la scipovanta danci Kirill vekiĝis ia subita malagrabla emocio. Ja ne havis mi la saman senton al aliaj, eĉ pli lertaj ol li en dancarto. Al ili mi rigardis kun plezuro, penante tute ne rigardi al Kirill (li dancis kun sia edzino, sed tute ne tio incitis mian malagrablan senton), kiu, ĉu intence, ĉu ne, penis dancadi antaŭ miaj okuloj. Sed mi staris kaj pensadis samtempe pri tia stranga sento, kiu posedis min dum longa tempo, subite (aŭ ne) malaperinta.

Sed eĉ nun mi ne scias – kio ĝi estis. Ĉu vi scias?

Klara Ilutoviĉ (Elektrostalj)

La sorto

Ne komprenas mi tiun ĉi vorton
Por uzadi ĝin kontraŭrutine.
Ĉu la hom’ vere faras la sorton
Aŭ la sorto lin faras obstine?

Ĉiu perdas, kaj trovas, kaj havas,
Kunportante la nepran doloron.
Se la sorto ekzistas kaj gravas,
Ĝi donacos al mi firman koron.

Tro facilas premate memori
Ies blindan feliĉon aŭ famon.
Se la sorto min emos favori,
Ĝi por mi ne avaros vivamon.

Ĉu hazarde nin io misgvidas –
Per vojturno, pluveto aŭ kanto?
Se la sorto min puni decidos,
Ĝi senigos min je Esperanto.

Kion pensi pri flugo aŭ falo?
Eblas lukti, malbeni aŭ penti…
Se la sorto ne estas realo,
Ĉu ne indus ĝin iam inventi?..

ANEKDOTOJ

el la reta dissendolisto <per-esperanto-humuro> ĉe Yahoogroups.com

Virino venas al juĝejo por doni deklaron pri divorco pro adultoj de sia edzo. La juĝisto, leginte la deklaron, provas admoni ŝin: "Pensu bone, eble vi tamen ŝanĝos la decidon pri divorco, vi ja havas du infanojn." Ŝi kolere ekkrias: "Ĉu kun tiu Donĵuano mi povas esti certa, ke ili estas LIAJ infanoj?"

Ĉu vi scias, ke Quentin Tarantino decidis produkti la filmon "Kill Bill" ("Murdi Bill-on") post kiam li dum tri horoj sensukcese klopodis instali kaj funkciigi Windows XP?

Renkontiĝas du edziniĝintaj virinoj. Unu el ili havas torton en la manoj. La alia demandas:

– Por kiu estas la torto?
– Por la sekretariino de mia edzo.
– Ĉu ŝi havas naskiĝtagon?
– Ne, sed tro sveltan figuron.

Blondaj studentinoj devas mezuri la alton de iu alta flagmasto. Ili alportas diligente ŝtuparojn, mezurilojn... tamen aŭ falas de sur la ŝtuparo, aŭ faligas la mezurilojn... Venas kolego, kiu eltiras la maston el la tero, kuŝigas ĝin kaj mezuras ĝin. La blondulinoj rikanas: "ni devis mezuri la alton, sed ne la... longon".

Iu viro ĉiuvespere venas en la saman drinkejon, mendas tri glasojn da vino kaj eltrinkas tion. Iufoje, babilante kun la drinkejmastro, li rakontis, ke havas du fratojn, kiuj loĝas en diversaj landoj; la fratoj interkonsentis, ke ĉiu el ili ĉiuvespere trinkos unu glason por si kaj po unu glaso por ĉiu el aliaj fratoj.

Sed iuvespere la viro venas en la drinkejon kaj mendas nur du glasojn da vino. La drinkejestro, supozante, ke io okazis al unu el la fratoj, delikate demandas:

– Pardonu, ĉu viaj fratoj bonfartas?
– Jes, – respondas la viro. – Tamen mi decidis ekde hodiaŭ ĉesi drinki.

Knabeto veturas en buso kun la gepatroj:

– Panjo, rigardu – lago!
– Panjo, rigardu – bovino!
– Panjo, rigardu – kamomiloj!
– Paĉjo, rigardu – blondulino!

KOKTELO

Evidentiĝas, ke la rusa kaj Esperanto tute interplektiĝis inter si, kaj parton de rusaj vortoj konsistigas E-aj vortoj, ekz. ***моно-грамма.*** *Do, sube vi trovos rusajn vortojn, kaj la kvanto de punktoj montras, kiom da literoj troviĝas en la ellasita parto, koincidanta kun E-vorto. La E-vortoj eniras kun finaĵoj. Por plifaciligi la respondon, post la rusaj vortoj enkrampe estas klarigata signifo de la E-vorto.*

1) . . . ва	(penetrante)
2) . . . . . на	(antaŭ ol trinki)
3) . . . . воз	(duopo)
4) с . . . . дина	(tradicia kutimo)
5) ш . . . о к	(senescepte)
6) рас . . . . е	(firme havi en manoj)
7) . . . . . дарность	(ŝerca mensogo)
8) по . . . . . . ть	(depreni maldikan supran tavolon de lignaĵo)

Solvoj de la tasko en REGo № 3 (22)

<u>KOKTELO</u>: *1) spiri; 2) kulo; 3) patro; 4) salo; 5) ami; 6) sur+ok; 7) streko; 8) tro; 9) ideo; 10) ribo.*

TROVU MEZON

Enmetu mankantajn radikojn laŭ la ekzemploj: LAKT {....} IKON - TANK, PILOT {....} PERON - TINE. La punktoj en krampoj indikas kvanton de literoj en la serĉata radiko, kiu konsistas el certaj literoj de la unua kaj dua vortoj, prenitaj en certa ordo.

MASTR { . . . . } SPERM
STURG { . . . . } PUDOR
GREG { . . . . } PRUN
KOST { . . . . } OMAR
DEKOR { . . . . } MONED
AMUZ { . . . . } DRAM
LABIRINT { . . . . . . } INTEGRAL
LAVAND { . . . . } PALETR
SONET { . . . . } TASK
KABL { . . . . } STOK
LAMP { . . . . } ARKT
KAJER { . . . . } RIGID
ANĜEL { . . . . } ERMEN
SUFLOR { . . . . } GRAFIK

La solvojn necesas sendi dum 2 semajnoj post ricevo de la gazeto al Tatjana Auderskaja poŝte (Ukrainio, 65026 Odessa-26, p/k 71) aŭ rete (<zoo@te.net.ua>, <verda99@mail.ru>).

Al la taskoj en la antaŭa numero de REGo plene kaj ĝuste respondis Svetlana Konjaŝova (Sanboli, Ĥabarovska regiono). Gratulojn! ***(Tatjana Auderskaja)***

<u>UTILAJ ADRESOJ</u>

<u>REU</u>: p/k 57, 105318 Moskvo; retadreso <esperanto@au.ru>; ttt-ejo <http://www.reu.ru/>

<u>Libroservo de REU</u>: p/k 4716, 432063 Uljanovsk; retadreso <yuka@vens.ru>; plena katalogo <http://reu.da.ru/rus/katalogo.htm>.

<u>REJM</u>: str. Dugina 17 – 62, 140180 Ĵukovskij, Moskva reg.; retadreso <rejm@euro.ru>; ttt-ejo <www.tejo.org/rejm>.

<u>UEA</u>: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando; retadreso <uea@uea.org>; ttt-ejo <http://www.uea.org>.

ESPERANTISTO EN LA EŬROPA PARLAMENTO



La pola entreprenisto, ĵurnalisto kaj esperantisto Małgorzata Handzlik estas elektita ano de la eŭropa parlamento. Ŝi parolas Esperanton de dudek jaroj, kaj Esperanton parolas ankaŭ ŝia tuta familio. Ŝia edzo estas la konata “bardo sen barbo”, Georgo Handzlik. En la Eŭropa Parlamento sinjorino Handzlik agos en la plej granda frakcio EPP, Eŭropa Popola Partio.

Małgorzata Handzlik estas en esperantistaj rondoj pli konata per la esperantigita formo de sia nomo, Margareta. Ŝi neniam aktivis en iu politika partio, sed nun kandidatis en la eŭropaj elektoj en la listo de la partio “Civitana platformo”, kaj sukcesis post nur ses-semajna kampanjo kolekti la necesan kvanton de voĉoj. Laŭ ŝia ttt-ejo <http://www.malgorzatahandzlik.com/>, ŝi decidis kandidati, ĉar ŝi estas forte ligita al sia hejma regiono, kaj la decidoj de la eŭropa parlamento influos la vivon tie, la agadon de la entreprenoj kaj la ĝeneralan evoluon. En la eŭropa parlamento Małgorzata Handzlik volas labori por sia hejma regiono, sed ŝi ankaŭ esperas aktivi en komisiono, kiu zorgas pri lingvaj aferoj, kaj tie engaĝiĝi por Esperanto. Ankaŭ en sia kampanja retpaĝo ŝi plurloke mencias Esperanton, kaj la retpaĝo enhavas esperantlingvan membiografieton.

De 15 jaroj Małgorzata Handzlik kune kun sia edzo Georgo (Jerzy) Handzlik gvidas plurajn entreprenojn, el kiuj plej konata inter esperantistoj estas la eldonejo “KLEKS”, kiu eldonas librojn kaj sondiskojn en Esperanto kaj la pola lingvo. Małgorzata Handzlik havas du filinojn en la aĝoj de 10 kaj 13 jaroj.

Małgorzata Handzlik laŭ la ĝisnunaj informoj estas la sola esperantisto, kiu elektiĝis al la eŭropa parlamento. Tamen ankaŭ en Francio la esperantistoj havis sukceson en la elektoj. La listo “Eŭropo Demokratio Esperanto” ricevis ne nur atenton de la amaskomunikiloj, sed ankaŭ pli ol 25000 voĉojn. Tamen tiu kvanto, kiu egalas al proksimume 0,15 procentoj, ne sufiĉis por loko en la nova eŭropa parlamento, kiu kolektiĝis en Bruselo en julio.

(Libera folio)

REGo (Rusia Esperanto-Gazeto) ***№ 4 (23) aŭgusto 2004***

komuna eldono de REU kaj REJM

redaktas Garik Kokolija *kunredaktas* Viktor Aroloviĉ

poŝta adreso Pjatnickoje ŝosse 45 – 105, 125310 Moskvo, Rusio

retadreso <gazeto@mail.ru>

abontarifoj por 2004:

por loĝantoj de Rusio kaj aliaj landoj de KSŜ – 140 rubloj sendendaj al:

Георгий Владимирович Коколия, Пятницкое шоссе 45 – 105, 125310 Москва

por loĝantoj de aliaj landoj – 15 eŭroj pagendaj al la konto **kklg-r** *ĉe UEA*